

1978 januaro

71-a jaro


n-ro 865 (1)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — nl-3015 bj rotterdam — nederlando



Mondverko en mondlingvo

p.9

Vi trovos

ke ĉi tiu revunumero impresas kiel dutema broŝuro, kiu traktas la idean fonon de la Movado en Irano kaj la aperon de "Donkiĥoto" en la Internacia Lingvo. Tiuj du temoj okupas pli-malpli precize duonon de la revua spaco. Krome, vi verŝajne rimarkos, ke la ĉefartikolo, kaj poste ankaŭ d-ro Saheb-Zamani en sia intervjuo, asertas, ke ni en la nuna tempo ne plu bezonas beletraĵojn en Esperanto. Tio estas interesa starpunkto, kiun ne eblas trakti tiel ekstremisme per "jes" aŭ "ne". Ni klopodis oponi tiun starpunkton el la intervjuo per la spaco, kiun ni donis al novaperinta beletraĵo. Ni bezonas ankoraŭ longe kaj multe bonajn beletraĵojn, sed ni ja — kaj urĝe — bezonas ankaŭ la fakan literaturon pri kiu pledas d-ro Saheb-Zamani. Cetere, "Donkiĥoto" estas bonvena ankaŭ pro la fakto, ke Fernando de Diego verŝajne ne kapablas regali nin per "elefant-breda" aŭ "laser-pova" terminaro. En la Movado — kaj en la lingvo — ekzistas ankoraŭ loko kaj sentiĝas bezono tiel por novaj terminaroj, kiel por pliaj "Donkiĥotoj".

Sed, ni uzu la reston de ĉi tiu improviza revua anguleto por diri al vi ion tute alian, ion belan kaj sinceran, kio akompanu vin dum vi legos nian jar-kolekton numero 71. Jen do (grandlitere pro la graveco de la mesaĝo):

feliĉon kaj prosperon en 1978.

Enhavo

- 1 La Tria Mondo kaj Esperanto: Irana leciono (V. Sadler)
- 2 Informoj de CED: Lingva krizo en Unuiĝintaj Nacioj: Raporto kiu akuzas (kompilis Anna Brennan)
- 4 Intervjuo kun d-ro M.H. Saheb-Zamani: Ni ne lernas Esperanton pro lukso, sed pro malsato pri novaj scioj (V. Sadler)
- 9 Recenzoj ("La inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha")
- 14 TEJO-paĝo: KEJA kaj ĝia vojo (sm), Novaĵoj pri la 34a Internacia Junulara Kongreso en Veliko Tarnovo
- 15 Kongresa komuniko — novaĵoj pri la 63a Universala Kongreso en Varno
- 17 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 19 Oficiala informilo el la CO de UEA, Ekzameno E (Bernard Golden)
- 20 Esperanto en radio, Anoncetoj

La kovrilo

La apero de "La inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha" — aŭ pli mal-longe "Donkiĥoto" — en Esperanto estas ekstreme grava evento por la Zamenhofa lingvo. Malfacilas trovi en la tuta literatura heredaĵo de la mondo verkon, kiu pli multe populariĝis kaj internaciĝis, ol la genia romano de Cervantes. Estis tial grava manko de la Internacia Lingvo ĝis nun resti sen kompleta traduko de tiu ŝlosila ĉefverko de la hispana — kaj monda — literaturo. La apero de la traduko de Fernando de Diego, laŭ sia graveco, egalas al la Esperantaj eldonoj de "Dia Komedio" aŭ "Kalevala". Tamen, la verko de Cervantes havas ŝancojn ankaŭ en la Esperanto-movado populariĝi pli vaste, ol la verko de Dante aŭ la granda finna eposo. La romano pri la nobla hidalgo simple havas en si kvazaŭ programitan populariĝon, ĝi estas facile kaj kun ĝuo legebla pli-malpli de kiu ajn leganto, ĉiu admiros ĝin pro iu el ĝiaj grandioze interplektiĝantaj trajtoj. Krome, "Donkiĥoto" ne impresas kiel beletra historiaĵo, sed prefere kiel moderna romano pri la epoko en kiu vivas ni mem, la nunaj legantoj de la majstraĵo naskiĝinta antaŭ kvar jarcentoj. Tial "Donkiĥoto" sur nia kovrilo, tial nekutime ampleksa recenzo, kiu okupas kvaronon de ĉi tiu revunumero.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto). Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). Legantoj en 86 landoj. Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 33,00 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 55,— gld). Unuopa ekz. 3,— gld.

Anonctarifo: 1p. 500 gld. 1/2p. 265, 1/4p. 145, 1/8p. 85, 1/16p. 55 gld. Nemovadaj komercaj entreprenoj pagas duoble. Anoncoj sur la ekstera kovrilpaĝo kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, Rotterdam-3002 (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj la Financa Programo: d-ro Humphrey Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne PA 19050, Usono; telefono (215) 259 8821.

Vicprezidanto kaj estrarano pri informado kaj kulturo: mag. William Auld, 20 Harviestoun Road, Dollar, Clacks., FK14 7HG, Britio; telefono (02594) 2339.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado kaj la delegita reto: prof. d-ro Carl Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; telefono (472) 44 80 85.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri planado: d-ro Werner Bormann, Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FR Germanio; tel. (040) 7384508.

Estrarano pri landa kaj regiona agado: s-ino Ursula Grattapaglia, Caixa Postal 04-0097, BR-70000 Brasília, Brazilo.

Estrarano pri administrado, financoj kaj specialaj taskoj: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge, Belgio; telefono (050) 35 49 35.

Estrarano pri edukado: s-ro Andrzej Pettyn, skr. poczt. 46, PL-05-710 Miłanówek, Pollando.

Estrarano pri kongresoj kaj turismo: d-rino Flora Szabó-Felső, Várady A. út. 4, H-7621 Pécs, Hungario; telefono (072) 16 725.

Irana leciono

LA RAPIDE KRESKANTAJ SUKCESOJ atingitaj por Esperanto en Irano — pri kiuj oni povas legi en ĉi tiu kaj en la antaŭa numeroj de la revuo — prezentas du lecionojn al la internacia Esperanto-movado. La unua admono jam aperas klare el la dua parto de la intervjuo kun la iniciatinto de la irana movado: La monda movado devas urĝe revizii sian laborplanon, precipe sur la kampo de eldonado, por kontentigi la bezonojn de la tiel nomata Tria Mondo. La dua leciono trudiĝas el komparo de la irana agado kun ekzemple la eŭropa: La pli malnovaj movadoj stagnas aŭ malprogresas, ĉar ili komforte forgesis pri sia unua prioritato: la disvastigo de la lingvo.

Ne unuafoje sur ĉi tiuj paĝoj ni akcentas la ĝis nun tro eŭropan konsiston de la Esperanto-movado. Restas ĉiam aktuala la admono de Zamenhof: "Por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas nomi ĝin tia". Necesas, ke la lingvo atingu mondan disvastiĝon — kaj por tio ne sufiĉas noti unuopajn lernantojn en la plimulto de afrikaj kaj aziaj landoj, sed necesas proporcia populariĝo ĉe la vastaj popolamasoj. Sufiĉas rigardi la tabelon de la UEA-membraro por vidi, per kiaj malfortaj radikoj Esperanto tenas sin en la duono de la landoj, kien ĝi entute penetris. Malgraŭ la malfortiĝo de la angla lingvo en Hinda Unio, ankoraŭ ekzistas tie pli da angle-parolantoj, ol da Esperanto-parolantoj en la tuta mondo. Dum du trionoj de la homaro loĝas en Azio, 85% de niaj membroj loĝas en Eŭropo kaj nur 5% en Azio...

Por ŝanĝi la situacion, necesas unue kompreni, ke la lingvaj problemoj de la Tria Mondo estas esence aliaj, ol tiuj de la cetera mondo. Dum en Eŭropo, ekzemple, la lingva problemo sentiĝas plej forte dum internaciaj vojaĝoj, en Azio aŭ Afriko la ĉefa problemo sentiĝas jam hejme, ĉe homoj, kiuj eble neniam vojaĝos eksterlanden. Ĝi estas problemo de la lingvo de kleriĝo, de edukado. Al homoj, kiuj dubas, ĉu ili iam havos eblecon vojaĝi alilanden, ne utilas rekomendi Esperanton kiel helpilon turisman. Al homoj, kiuj studadas fremdajn lingvojn, por ke per sia kripla, pasiva scio de tiuj lingvoj ili havu ŝancon lerni iom pri ekonomiko aŭ elektrotekniko aŭ medicino kaj tiamaniere atingi pli bone salajratan oficon — al tiaj ne utilas reklami, ke per Esperanto ili povos legi *Don Quijote*. Al tiaj realistoj tio ŝajnus efektive donkiĥota entrepreno!

La vere grandaj perspektivoj por Esperanto en Afriko kaj Azio — kaj, cetere, la tuta pli longdaŭra sukceso de la nova movado en Irano — postulas urĝan kaj serioze planitan laboron por laŭgrade disvolvi taŭge elektitan klerigan literaturon, precipe sciencan kaj teknikan, en la Internacia Lingvo. Tia eldona plano **ne** respondas al la ĉefaj interesoj de la jam ekzistanta (ĉefe eŭropa) Esperanta libromerkato. Sed ĝi **ja** respondas al la bezonoj

de la kreskigo kaj tutmondigo de la movado.

Nur tia literaturo povas doni sencon al la lernado de Esperanto por triamondanoj. Samtempe, tamen, el vidpunkto de la landoj, kie la movado jam establiĝis, tia reorientiĝo de la agado povas aldoni novan dimension al la idealisma signifo de Esperanto. Al ĝia valoro por la forigo de aliaj specoj de lingva maljusteco aldoniĝas ĝia valoro kiel rimedo por helpi la evolulandojn. Tamen, novaj lernantoj en la Tria Mondo ne povos tuj ensalti en la lingvaĵon de fakaj lernolibroj. Ili bezonas ankaŭ taŭgan legmaterialon por la transira stadio inter la unua lernolibro aŭ kurso kaj la ekutiligo de la lingvo por klerigaj studoj. Nek eŭropaj anekdotoj de antaŭaj jardekoj, nek sentimentaj rakontoj pri kongresaj amoj taŭgas por vivteni ilian intereson. Estas bezonataj modernaj tekstoj: aktualaj novaĵoj kulturaj, sciencaj, ekonomikaj, redaktitaj en facila lingvaĵo.

Ekzistas jam propono ampleksigi tiucele la revuon *Esperanto* per aldono de 12 ekstraj paĝoj al ĉiu numero — sed la kosto estus ĉirkaŭ 60 000 guldenoj jare laŭ la nunaj prezoj, kaj tio estas financa risko ne jam farebla, sen garantiaj subvencioj. Sed eble ankaŭ sur tiu kampo necesas revizii nian kutiman pensmanieron. Kio pli gravas: ĉu konservi altnivelan revuon kiel intelektan ludejon de kelkmil eŭropanoj — aŭ produkti allogan, instruan kaj klerigan gazeton por (potenciale) multoble pli granda nombro da legantoj en la evolulandoj? Por kiu ni elspezu tiujn 180 000 guldenojn jare (tiom kostas ĉi tiu revuo) — ĉu por la elito, kiu jam sukcese lernis la lingvon, aŭ por la multe pli granda nombro, kiu volus lerni ĝin, se ili havus taŭgajn materialojn? Por la veraj aktivuloj movadaj povas sufiĉi serioza organo de eble 1000 ekzempleroj. Ni konsideru ankaŭ, ke la kreskanta nombro de kolektivaj abonoj alportas ĉiam pli grandan proporcion de komencantoj en nian legantaron.

Tiu demando kondukas nin al la dua leciono ĉerpebla el la irana sperto: ke la malnova movado emas forgesi, ke ĝia ĉefa tasko estas la disvastigo de Esperanto. Se venas propono dediĉi pli da atento al komencantoj, ĝia kutima respondo estas, ke pri ili okupiĝu la lokaj kluboj, ke tamen Esperanto estas matura lingvo de vivanta socia komunumo kaj ke estas ofendo al la prestiĝo aŭ digno de la movado, se ni iel malkaŝas al la ekstera mondo, ke ĉe ni ankoraŭ ekzistas komencantoj. La vero tamen estas, ke Esperanto estas lingvo de ankoraŭ nur malgranda grupo de parolantoj, plejparte eŭropaj, kaj la vera danĝero por la prestiĝo de la movado estus ne la **ekzisto** sed la **manko** de komencantoj. Esperanto troviĝas ankoraŭ nur ĉe la komenco de sia mondkonkera vojo. Sekve estas necese, ke, dum longa tempo ankoraŭ, ĉiam pli granda parto de la movado konsistu el komencantoj. Tiel estas en Irano, kaj tio ja estas karakterizo de ĉiu ajn **kreskanta** movado.

Feliĉe, komencantoj ne mankas, eĉ en la malnovaj Esperanto-movadoj eŭropaj. Sed ili ja perdiĝas. Ĉiujare malfermiĝas tra la mondo almenaŭ 2000 novaj kursoj, en- kaj eksterlernejaj. Ni diru: kelkaj dekoj da miloj da novaj komencantoj. Malgraŭ tio, la movado ne kreskas.

Ĉu eble pro tio, ke la spertaj parolantoj ne havas tempon por helpi la komencantojn? Ili diskutas pri pioniroj, kompilas bibliografiojn de mortintaj projektoj, revizias kaj rerevizias statutojn, tradukas forgesitajn poemojn... kaj al neniu restas la tempo por redakti unu bonan gazeton por komencantoj aŭ verki informojn por la nacilingva gazetaro. Oni vivas komforte en la konata movada medio kaj eĉ ne rimarkas, ke la vorto "movado" ĉesis esti aplikebla... Oni havas sian plezuron el la uzo de Esperanto, sed oni forgesas, ke Esperanto ne estas "la lingvo por ni". Ĝi estas la lingvo por ili, por tiuj miliardoj da homoj, kiuj ankoraŭ ne lernis ĝin kaj plejparte eĉ ne aŭdis pri ĝi.

La irana kazo estas saniga kaj espereble ankoraŭ ĝustatempa memorigo, ke vera movado estas io dinamisma, eĉ agresa. Ni vidas tie vivantan pruvon, ke unu homo povas krei amasmovadon por Esperanto — havante nek organizaĵon, nek landan gazeton, nek kongresojn, nek estrarkunsidojn, nek kontrolkomisionojn, nek lokajn klubojn, nek libroservon. Naŭdek jarojn post la Unua Libro, ni emas forgesi, ke ĝuste tion faris ankaŭ Zamenhof.

V. Sadler

Informoj de CED

LINGVA KRIZO EN UNUIGINTAJ NACIOJ:

Raporto kiu akuzas

LA MULTECO DE LINGVOJ uzataj en Unuiĝintaj Nacioj kaŭzas seriozan maltrankvilon interne de tiu organizaĵo. Tion klare montras lastatempe eldonita dokumento de UN "Report on the implications of additional languages in the United Nations system" * (Raporto pri la sekvoj de aldonaj lingvoj en la UN-sistemo). Tiu raporto impresas kvazaŭ varbilo por Esperanto; ĝi agnoskas, ke la situacio jam atingis krizan nivelon. Stranga por esperantistoj, tamen, devas esti la konstato, ke la verkintoj evidente ne konscias pri la ekzisto de komuna lingvo, kvankam ili nerekte rekonas bezonon de ĝi per ĉi tiu frazo: "Pro la neekzisto de ĝenerale rekonita mondlingvo, lingvaj servoj ... estas esenca parto de la funkciado de la UN-sistemo." (Par. 112).

La raporton verkis "Joint Inspection Unit" (Komuna Inspekta Grupo), kiu studis la situacion en UN kaj ĝiaj filioj, de kiuj ĉiu havas 5 ĝis 7 "oficialajn" kaj 2 ĝis 7 "laborajn" lingvojn. La inspektistoj precipe maltrankviligis pri la financaj sekvoj de la multlingveco kaj montris en tabelo (Par. 20) la nombron de lingvaj stabanoj laborantaj en UN-organizaĵoj dum 1976, kun ties to-

tala kalkulita kosto. (En kelkaj kazoj, la ciferoj montras efektivan elspezon en 1976). Tiu tabelo devas aparte interesi esperantistojn, ĉar ĝi donas pli precizajn detalojn ol io ajn ĝis nun havebla tiurilate.

La tabelo (v. la kadron), kiu ne pritraktas nerektajn elspezojn rilate al lingvaj servoj, kiel ekz. la kostojn de administrado, oficejoj, presado ktp., montras ke en 1976 la totala rekta elspezo por lingvaj servoj en la UN-sistemo superis 100 milionojn da usonaj dolaroj. Rimarkinde estas, ke la malgrandaj organizaĵoj devas elspezi pli grandan proporcion de la tuta buĝeto por lingvaj servoj ol la grandaj; unu el la pli malgrandaj specialigitaj organizaĵoj kalkulis, ke, se ĝi havus nur unu laboran lingvon anstataŭ kvin, ĝia buĝeto estus nur 30%-40% de sia nuna sumo.

Kiu financas tiujn servojn? La situacio tre varias inter la diversaj organizaĵoj, sed plejparte la kostoj venas el la ordinaraj buĝetoj. Aliflanke, kiam la araba estis adoptita kiel oficiala kaj labora lingvo per la Rezolucio 3190 (1973 12 18) de la Ĝenerala Asembleo, la arabaj ŝtatoj proponis subvencii ties enkondukon dum la unuaj tri jaroj. Germanlingva tradukado estas grandparte financata de la germane parolantaj ŝtatoj, kvankam la 30a Monda San-Asembleo ĵus aprobis proponon pagi tion el la ĝenerala buĝeto.

La raporto pritraktas ne nur la financajn problemojn kreitajn per la multeco de lingvoj en UN. Grava estas ankaŭ la manko de bonaj interpretistoj kaj tradukistoj; ĉi tio ne estas nova afero, sed ĝi antaŭe pli temis pri manko de **kvalifikitaj** stabanoj, dum nun la malfacilaĵo estas simple trovi **sufiĉajn**, senkonsidere al kvalito. Precipe ekzistas problemoj rilate al la kreskanta kvanto de fakaj kaj teknikaj tradukendaj dokumentoj. Ju pli da lingvoj uzataj, des pli serioza la situacio, ĉar el ĉiu lingvo oni devas traduki en ĉiujn aliajn. Tio signifas, ke dum 7-lingva kunveno, ekzistas 42 eblaj interpret-kombinoj, kaj devas ĉeesti sufiĉaj interpretistoj por certigi, ke ĉiu el la kombinoj estu realigebla.

La enkonduko de la ĉina kiel labora lingvo (1973), kaj de la araba kiel oficiala kaj labora lingvo, akriĝas la malfacilaĵojn. Ekzistas terura manko de interpretistoj kaj tradukistoj de ĉi tiuj lingvoj, kiujn malmultaj homoj krom denaskaj parolantoj sufiĉe bone konas por fari tian laboron. Male al la kutimo, arabaj kaj ĉinaj interpretistoj ofte estas petataj traduki ne nur en la propran "aktivan" lingvon, sed ankaŭ en aliajn "pasivajn". Rezulte okazas miskomprenoj kaj eraroj. Krom tio, plejparte la homoj, kiuj kapablas interpreti en la araban aŭ la ĉinan, povas fari tion nur el la angla aŭ la franca. La solvo estas uzi unu el ĉi tiuj lingvoj kiel ponton kaj interpreti **per** ĝi en aliajn lingvojn (aŭ inverse). La plimulto en la UN-sekretariato konsideras ĉi tiun metodon nekontentiga; laŭ unu organizaĵo, "Ĉe sciencaj kunvenoj, la informo-perdo per "helpilo" estas almenaŭ 50%." (Par. 93). Ne ĉiuj konsentas pri tio, tamen.

Multlingveco kreas ankaŭ teknikajn problemojn. Samtempaj interpretistoj devas sidi en sonizolitaj budoj, ligitaj al la parolanto kaj aŭskultantoj per sub-planka

* A/32/237, 1977 10 11



Anstataŭ nutri la malsatantojn, en 1976 oni elspezis sept-cent mil dolarojn por traduki – en ses lingvojn – la raportojn pri la malplenaj stomakoj.

drataro. Kostis \$1 295 000 por adapti konferenc-ĉambrojn en la ĉefsidejo de UN, kiam la araba estis aldonita al la sistemo. Tiu fizika problemo limigas la eblecon enkonduki novajn lingvojn; unu organizaĵo raportis ke, "Kiam oni decidis oficialigi la ĉinan lingvon, budo devis esti konstruita **super** la (kvar) ekzistantaj, atingebla per ŝtupetaro. Estas neeble konstrui ankoraŭ unu budon, kaj sekve tute ne ekzistas ebleco adopti novan oficialan lingvon intertempe." (Par. 100).

En siaj konkludoj, la raportistoj agnoskas la hororan koston de la lingvaj servoj kaj petas, ke tiuj ne konsumu

tro grandan proporcion de la haveblaj rimedoj. Ili sugestas, ke oni evitu la aldonon de novaj lingvoj al la sistemo, kaj provu limigi la postulatan kvanton de tradukado. Oni reduktu ankaŭ la nombron de dokumentoj; la inspektistoj precipe mencias raportojn pri kunsidoj kaj kalkulas, ke produkti 50-paĝan raporton en 5 lingvoj kostas preskaŭ \$2 000. Ili krome sugestas, ke oni malpli uzu reviziistojn kaj redaktorojn, sed rekonas, ke tio povus kaŭzi malaltigon de la nivelo.

Alia rekomendo estas la kreo de komunaj "provizejoj" de interpretistoj kaj tradukistoj, sed en la nuna situacio ĉi tiu ideo estas ne praktika. La programo de kunsidoj estas ne sufiĉe antaŭvidebla por certigi, ke centra "provizejo" ĉiam havus la necesan stabon okaze de subita postulo. Ankaŭ ĝi estus tre multekosta afero, precipe ĉar la stabanoj kompreneble ofte devus veturi. Tia servo tamen estas starigata por la araba lingvo. La inspektistoj vidas pli da espero en la moderna rapida tekniko de faksimil-sendado, kiu limigus la bezonon veturigi taĉmentojn da tradukistoj al konferencoj, sed ankoraŭ ĝi restas sufiĉe kosta.

Estas klare, ke la raportistoj tute ne vidas eliron el la situacio. Ili povas nur peti, ke oni evitu nenecesajn postulojn de la lingvaj servoj, kaj provu tranĉi elspezojn kiam eblas. Alivorte, ili sugestas reduktion de ekzistantaj servoj kaj malaltigon de la nivelo. Tiuj rekomendoj provizus nur mildigon de la problemo dum mallonga tempo. La vortoj cititaj en la unua alineo de ĉi tiu artikolo montras, ke la verkintoj de la Raporto jam rekonas almenaŭ la teorian eblecon de la sola daŭra solvo.

Kompilis Anna Brennan

Organizaĵo (inkl. de regionaj oficejoj)	Konstanta lingva stabo (postenoj)	Okazaj dungitoj (laŭ labortagoj)	Lingvaj kostoj 1976 (\$ '000)	Procentaĵo de la buĝeto 1976
Unuiĝintaj Nacioj (Nov-Jorko)	1 082	46 450	27 016	7,5
Unuiĝintaj Nacioj (Ĝenevo)	585	25 750	22 842	6,4
Ekologia Programo de UN	43	3 570	656	7,5
Industria Evoluig-Organizaĵo de UN	85	7 012	2 876	13,0
Nutraĵa kaj Agrikultura Organizaĵo	298	8 050	6 944	5,6
Internacia Atom-Energia Agentejo	101	1 950	2 996	8,7
Internacia Civila Aviad-Organizaĵo	182	2 695	4 000	26,8
Internacia Labora Organizaĵo	265 ¹⁾	10 464 ²⁾	9 628	11,9
Inter-Registara Mara Konsult-Organizaĵo	62	8 680	1 220	23,0
Internacia Telekomunika Unio	119	18 288	4 581	22,6
Unesko	179	36 908	10 138	11,0
Universala Poŝta Unio	16	799	650 ³⁾	10,0
Monda Organizaĵo pri Sano	304	11 271 ⁴⁾	9 741	7,5
Monda Meteorologia Organizaĵo	65	1 842	1 780	18,9
SUMOJ	3 386	184 267	105 297	-

1) Ekskluzivas ne-lingvajn stabanojn, okaze plenumantajn prilingvan laboron. Inkluzivas stabanojn kun kontraktoj por difinita periodo.

2) Nekonstantaj konferencaj stabanoj.

3) Rondigita ekvivalento de Sv. Fr. 1 624 000 (kurzo: 1 dolaro = 2,50 frankoj).

4) Ekskluzivas afrikajn kaj amerikajn regionajn oficejojn, pri kiuj labortagaj statistikoj ne estas haveblaj.

Noto: Estas grave konstati ke kriterioj tre diversas inter organizaĵoj, ekz. rilate la difinon de "lingva stabo", aŭ la sistemon uzatan por mezuri la koston de lingvaj servoj.

Ni ne lernas Esperanton pro lukso, sed pro malsato pri novaj scioj

La unua parto de ĉi tiu intervjuo, kiu aperis en nia decembra numero (paĝoj 202–207), estis rakonto pri la amasa Esperanta aktivado en Irano. Ĉi tiu dua parto de la intervjuo kun d-ro M.H. Saheb-Zamani prezentas la idean fonon de la irana movado. Temas pri nova rilato al la Internacia Lingvo, pri ideoj, kiujn oni eĉ teorie apenaŭ tuŝis ĝis nun, sed kiujn Irano komencis praktiki en antaŭe nevidita skalo.

Demando: Ŝajnas, ke vi estas aparte ideologie ligita al Esperanto. Vi vidas en ĝi ne nur instrumenton por internaciaj kontaktoj sed ankaŭ rimedon por evoluigo de la junularo en la Tria Mondo.

Respondo: Ni rigardu la aferon el la vidpunkto de la informteorio. Ni devas elekti taŭgan komunikilon por ĉiu komunikaĵo. La universalaj profetoj — ĉu spiritaj, ĉu materiismaj — neniam pensis pri la komunikilo, kiun ili devas elekti por sia mesaĝo. Ekzemple, Marks skribis, ke ĉiuj suferantoj devas unuiĝi. Sed per kiu lingvo ili unuiĝu? Ĉu per la paŝtua, la farsia, la guĝrata aŭ la germana? Ĉu ili lernu la germanan aŭ atendu tradukon en ilian lingvon, kaj kiu traduku? Ĉu la aristokratoj, kiuj povis vojaĝi al Eŭropo kaj lerni eŭropajn lingvojn, traduku tiajn verkojn por la popolamasoj, por ke tiuj unuiĝu kaj ribelu kontraŭ la aristokrataro?

La kultura heredaĵo de la homaro akumuligis unuavice en la okcidentaj landoj, kaj mankas komunikilo por transporti ĝin al la ceteraj mondpartoj. Malekvilibro ekzistas ne nur en ekonomio kaj sano sed ankaŭ en scio, kaj la scion ni ne povas transporti al la Tria Mondo. Nur kiam ni povos levi la nivelon de scio en la Tria Mondo, la tieaj popoloj povos helpi sin mem. Kaj nur tiam la aliaj popoloj povos helpi ilin efike. La unua helpo, kiun ni povas kaj devas doni al ili, estas havigi al ili komunikilon, kvazaŭ telefonon, pere de kiu ili facile povu proprigi al si la scion, la kulturan heredaĵon, la sciencon kaj teknikon de la Okcidento kaj, pere de tio, atingi ian kulturan egalrajtecon kaj ekvilibron. Sen tia komunikilo, restos la diskriminacio en la kultura sfero, kaj sekve ankaŭ en la ekonomika kaj eble eĉ en la rasa — ĉio ĉi pro la lingva handikapo de la Tria Mondo, kiu ne povas sekvi la mondan evoluon de la kulturo kaj de la tekniko. Estante psikologo, mi scias, ke la homa inteligento ne estas specifa apartenaĵo de la okcidentaj aŭ de la (politike) orientaj popoloj. Ankaŭ la popoloj kaj la junularo de la Tria Mondo estas tre inteligentaj. La distribuo de inteligento estas ĉie sama. Do, se ne ekzistus tiu lingva handikapo, ili ne postrestus.

Tial temas pri pli ol nura ideologio. Sen tia komunikilo, mi opinias, ĉiuj ideologioj malsukcesos. Necesas doni al ili neŭtralan lingvon, per kiu ili povos aliri al la kultura heredaĵo de la tuta homaro. Kaj tion, laŭ mi,

ni devas fari por la tuta Tria Mondo. Ĉiuj povus tion kompreni, se la intelektuloj povus alparoli ilin kaj prezenti al ili la valoron de Esperanto kiel revolucio en la tezo kaj antitezo de la komunikilo kaj la komunikaĵo, kiuj nun estas en sintezo. Mi ne volas profundigi ĉi tie en la teoriojn de Marshall McLuhan pri komunikilo, komunikaĵo ktp. Ili ne estas pravaj. Ni devas unue havi komunikilon, kaj poste ni povos transdoni la komunikaĵon.

Kiam mi pripensas la problemojn de la junularo en la Tria Mondo, mi konstatas, ke ĉiuj parolas supraĵe pri tio, ke la junularo havas jen tiun, jen alian problemon. Sed, la fundamenta problemo estas jeno: Nuntempe en la Okcidento ekzistas tiom da scienco, da scioj kaj tekniko, kiujn potenciale povus profiti la junularo de la Tria Mondo, sed tiujn ili ne povas atingi pro la lingvaj baroj kaj diskriminacio. Do, mi antaŭvidas profundan revolucion por la tuta Tria Mondo. Tion ili devas povi atingi pere de komunikilo tre facile lernebla. La 347 jaroj da brita kolonia regado en Hindujo kaj aliaj mondpartoj pruvis, ke la tiel nomataj naturaj lingvoj de la Okcidento ne taŭgas kiel tia komunikilo, kian ni bezonas. Por mi, Esperanto estas tiu komunikilo.

D: Ĉu vi povas iomete precizigi la lingvan situacion en Irano kaj ankaŭ klarigi, kial la studentoj ĉi tie estas en malavantaĝa pozicio en akirado de scioj?

R: Nu, nia lerneja sistemo grandparte similas al multaj el la sistemoj en la Okcidento. [La tempon] de la unua lernojaro ĝis la 12a, ni konsideras "lernejo", kaj post tio komenciĝas la universitato, kompreneble. Tiuj 12 lernejoj dividiĝas al kvinjara elementa lernejo, trijara postelementa lernejo kaj mezlernejo aŭ gimnazio dum kvar jaroj. Post tio la lernantoj ricevas diplomon pri scienco, pri matematiko, pri natursciencoj, pri literaturo aŭ pri ekonomiko. En la postelementaj kaj mezaj lernejoj, t.e. entute dum sep jaroj, la lernado de unu fremda lingvo estas deviga. Plejparte tio estas nuntempe la angla, sed parte ĝi estas la araba, kompreneble. Tiu fremdlingva lernado daŭras proksimume 6 horojn semajne dum 7 jaroj. Tio signifas unu kvinonon de la lernotempo, ĉar la semajna programo ampleksas 30 horojn. Sekve, ankaŭ la kosto devas esti ĉirkaŭ unu kvinono de la tuta buĝeto de la Ministerio de Edukado. Laŭ la pasintjara

buĝeto tio prezentas elspezon de 400 milionoj da usonaj dolaroj, nur por lingvolernado. Kun kia rezulto? Pasintjare la ministro pri edukado mem deklaris, ke post 7 jaroj da lingvostudoj niaj lernejoj ne kapablas skribi aŭ elparoli eĉ unu solan anglan frazon senerare. Do la rezulton ni rajtas rigardi kiel nulan.

La suma tempo uzata, laŭ proksimumaj kalkuloj (en niaj lernejoj estas ĉ. 3 milionoj da infanoj), estas 1,2 miliardoj da horoj jare. Entute, por sep jaroj, tio signifas elspezon de 2,8 miliardoj da dolaroj kaj ĉirkaŭ 9 miliardoj da horoj — nur por la lernado de lingvoj. Kaj, laŭ mia opinio, bazita sur statistikoj, intervjuoj kaj artikoloj diversloke aperintaj, la situacio pri lingvolernado nenie en la Tria Mondo estas pli bona, ol ĉe ni. Pro similaj rezultoj, kiel vi scias, la angla lingvo ne plu estas deviga instruobjekto de la lernejoj de Japanujo. En Hinda Unio, la angla fariĝas nur duon-oficiala lingvo, ne plu la oficiala, kaj por tio necesas nur ĉirkaŭ 1/14 de la tempo, kiun la kolonia potenco bezonis por enkonduki ĝin en Hindujo. Vere, la investo de tiom da laborhoroj kaj monrimedoj estas por la malriĉaj landoj kompleta perdo.

D: Ĉu ne ekzistas ia adekvata scienca literaturo en la persa lingvo, por ke la studentoj povu kleriĝi pri la

ligitajn al iuj usonaj universitatoj; ni havas arablingvajn universitatojn por teologiaj studoj, kaj nun oni fondos ankaŭ germanlingvan universitaton. Estas vere ĥaoso, kaj la homoj fariĝas fremduloj en sia propra lando; ili ligas sin jen al unu, jen al alia kulturo, kaj ni perdas nian kulturan unuecon kaj kulturan personecon. La intelektuloj ĉiam pli fremdiĝas al la popolamasoj kaj ankaŭ fremdiĝas inter si, depende de tio, ĉu ili studis en Usono aŭ Francujo aŭ Germanujo aŭ aliloke.

Ni devas lerni fremdan lingvon, do kial ne unu universalan lingvon? Mi menciis la koston de fremdlingva instruado en lernejoj, sed oni memoru, ke ankaŭ en la universitatoj oni instruas fremdajn lingvojn, same en diversaj privataj elementaj lernejoj, kiuj estas tre multekostaj, tiel ke malmultaj povas sendi siajn infanojn tien. Multaj infanoj kaj studentoj iras eksterlanden por lerni fremdan lingvon, kaj tio kaŭzas multajn miskomprenojn kaj psik-origajn malsanojn; multaj, kiam ili revenas el eksterlando, estas fremdiĝintaj, kaj tio kreas multajn problemojn por nia lando. Simile estas en ĉiuj aliaj tiaj landoj.

D: Do — dum en Eŭropo ekzemple oni allogas lernantojn al Esperanto, dirante: "Jen facila lingvo, kiun vi povas uzi, kiam vi vojaĝas por libertempo, por



Irana intereso pri la Internacia Lingvo estas amasa fenomeno: Unu el la kursoj kaj ekspozicio al kiu venis ankaŭ d-ro Motamedi, la nova rektoro de la Universitato de Teherano.

modernaj scienco kaj tekniko pere de ĝi, aŭ ĉu oni ne povus evoluigi en la persa lingvo tian literaturon?

R: Kiel vi scias, la scienco kreskas, laŭ la kalkuloj de la sociologoj kaj historiistoj pri scienco, je proksimume 6,6% jare. Tio signifas, ke la scienca literaturo duobliĝas en la daŭro de ĉ. 11 jaroj. Mi povas diri malkaŝe, ke tia kresko tute ne ekzistas en la persa lingvo — lingvo de 35 milionoj da homoj ĉi tie kaj eble de entute 50 milionoj, se oni enkalkulas tiujn, kiuj parolas ĝin en Afgano, Hinda Unio, Pakistano, Taĝikujo kaj aliloke. Ankaŭ aliaj lingvoj neniel povas konkuri kun tia grandega kresko de la scienco; simple ne eblas tiakvante tradukadi en tiujn lingvojn. Do, ni vere ne posedas sciencon literaturon kaj tial ni devas studi fremdajn lingvojn. Ni havas franclingvan universitaton en Hamadan, anglalingvajn universitatojn en Ŝiraz,

korespondi, por kolekti poŝtmarkojn ktp.” — via strategio rilate la Trian Mondon estas argumenti, ke jen estas lingvo, per kiu oni povos atingi superan kleriĝon, anstataŭ pere de la angla, franca, germana aŭ alia lingvo, kiun oni nur kun granda peno kaj nur en esceptaj kazoj lernas sukcese. Ĉu vi ne renkontas tamen la argumenton aŭ la dubon ĉe viaj studentoj, ĉu Esperanto havas tian literaturon aŭ povas evoluigi tian literaturon, ke ĝi povos anstataŭi ekzemple la anglan?

R: Unue mi devas komenti pri la unua parto de via demando, antaŭ ol respondi al la dua parto. Mi sincere respektas la laboron de la Esperanto-movadoj en la Okcidento — Ameriko kaj Eŭropo — sed mi devas konstati, ke ili rigardas Esperanton kiel agrablaĵon, ian luksaĵon. En iliaj lingvoj ja ekzistas adekvataj literaturoj, kaj neniam ili venas al la ideo, ke por ili necesus

lerni fremdan lingvon por akiri eĉ nur elementan scion pri unu aŭ alia fako. Do kial ili lernu Esperanton? Por mi tio estas miriga; por ni en la Tria Mondo estas mirige, ke ili lernas Esperanton, kaj estas tre laŭdinde, ke ili faras tion.

Sed ili kunvenas, ĉiujare 3-5 tagojn eble en iu kongreso, ili kantas, iom diskutas, renkontiĝas, iras hejmen kaj interŝanĝas poŝtkartojn aŭ eble kaseton en Esperanto. Por ni, aliflanke, temas pri nia kultura vivo aŭ morto. Ni devas elekti iun lingvon, kaj pere de tiu lingvo ni devas akiri la scion, pri kiu ni malsatas, la teknikan scion de la moderna mondo. Ni devas elekti unu lingvon, ĉar ni ne povas oferi tiom da tempo, kiom necesas por lerni 2 aŭ 3 lingvojn — nur por lerni iun rimedon por atingi la celon. Ni jam konstatis, ke, ĝenerale, ni ne kapablas mastri la anglan, francan aŭ germanan, eĉ post 10 aŭ 15 jaroj da studado. Do, por ni Esperanto signifas esperon. Sed ne kiel luksaĵo, ne kiel nura rimedo por korespondi kaj informi unu la alian pri la turismaj belaĵoj de niaj respektivaj landoj aŭ por interŝanĝi poŝtmarkojn. Ni bezonas lerni ĉi tiun lingvon por scienco kaj tekniko, kaj ni bezonas povi lerni pri scienco kaj tekniko per tiu lingvo. Bedaŭrinde, se niaj studentoj scius, ke tiu literaturo, kiun ili bezonas por lerni pri natursciencoj kaj sociaj sciencoj kaj tekniko, ankoraŭ ne estas havebla en Esperanto, ili senreviĝus kaj perdus la entuziasmon, kiun ili nun montras. Tio estas granda danĝero. En publika letero al la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko mi provis klarigi tion. Mi estas certa — kaj kiel specialisto por la Monda San-Organizo mi multe vojaĝis tra aliaj landoj de la Tria Mondo —, ke la situacio estas simila en ĉiuj evolulandoj.

D: Evoluigi signife utilan edukan literaturon en Esperanton bezonas sufiĉe grandajn financajn rimedojn. La ĝisnuna literaturo de Esperanto, kiel vi scias, estas konstruita per penaj oferoj de individuoj kaj granda laboro tra pluraj jardekoj. Kiel vi imagas, ke estus eble evoluigi pli rapide tian literaturon por kontentigi la bezonojn de la Tria Mondo, kaj pri kiuj specoj de literaturo estas la bezono plej urĝa laŭ via opinio?

R: Estas efektive malfacile tion respondi. La popolamasoj de la Tria Mondo sentas bezonojn sed ne scias, ofte, kiel kontentigi tiujn bezonojn. Grandparte ili estas ankaŭ malriĉaj kaj ne povas antaŭe investi monon por produktado de libroj. Sed ja ekzistas eblecoj kunlabori kun multaj eldonistoj en la Tria Mondo por eldono de sciencaj verkoj. Ekzistas riĉaj eldonistoj, kiuj pretas oferi monon por bonaj celoj. Ankaŭ multaj okcidentaj eldonistoj estus pretaj eldoni en Esperanto, se per kunlaboro de niaj organizaĵoj ni povus garantii al ili iun minimuman eldonkvanton. Kyankam ni havis en niaj kursoj ĉi tie nur 2 500 lernantojn en la unua jaro, tamen jam vendiĝis 7 000 ekzempleroj de nia lernolibro, kaj la lernantoj nun komencas postuli aliajn, pli taŭgajn legaĵojn. Necesus, ke la okcidentaj Esperanto-organizaĵoj turnu sin al konataj eldonejoj, ekzemple al la brita eldonejo Penguin, klarigante la perspektivon pri la potenciale kreskanta merkato en la

Tria Mondo kaj proponante, ke ili garantios aĉeti difinitan bazan kvanton (ekzemple mil ekzemplerojn) de ĉiu taŭga verko, kies tradukon en Esperanto komisiis kaj eldonos tiu eldonejo. Ankaŭ en Japanujo certe troviĝas eblecoj tiuspecaj. Krome, inter la ĉefaj taskoj de Unesko estas la popularigo kaj disvastigo de la scienco kaj kulturo, precipe al la landoj de la Tria Mondo. Ĝi devus kunlabori kun la Esperanto-movado por kreskigi tian literaturon en Esperanto.

Unuavice, laŭ mia opinio, necesus eldonigi bazajn lernolibrojn pri sociaj sciencoj kaj due pri studoj matematikaj-teknikaj. Provizore ne estas bezonataj poezio kaj belliteraturo. Tre taŭgaj estas ekzemple

REKOMENDO DE ISLAMA GVIDANTO

"Esperanto ne estas religio, filozofio aŭ ideologio, kaj verĝi ne estas mem celo sed nur rimedo, kiu povas helpi la realigon de paco en la mondo kaj internacian kompreniĝon. Mi esperas, ke ĉiuj mondaj gvidantoj agnoskos la valoron de Esperanto por internacia kompreniĝo kaj sian respondecon antaŭ la popoloj realigi ĝian potencialon." Tiaj estis la konkludaj vortoj de la opinio, kiun esprimis unu el la kvin superaj gvidantoj de ŝijaismo — la orienta branĉo de islamo —, lia sankta moŝto Aĵatula Ŝariatmadari, okaze de aŭdienco donita la 5an de novembro 1977 al d-roj Saheb-Zameni kaj Sadler, en ĉeesto de pluraj aliaj religiaj gvidantoj.

malgrandaj enciklopedioj aŭ informlibroj pri sociaj sciencoj, pri ekonomiko, pri industrio k.s. Tiaj verkoj ekzistas en multaj lingvoj, ekzemploj estas la serioj *Pelican* en Britujo, *Que sais-je* en Francujo. Ni povus elekti la plej bonajn en ĉiu kampo, kaj traduki ilin en Esperanton. Tio havus samtempe la rezulton, ke per tio multe riĉiĝus la lingvo per la evoluigo de la baza scienca terminaro, kio estas tre necesa. Poste povus sekvi pli ampleksaj enciklopedioj, prestiĝaj eldonaĵoj, kiuj ebligus konvinki eĉ la plej skeptikajn intelektulojn de la Tria Mondo, ke Esperanto povas konkurenci kun ĉiu ajn alia lingvo. Sed mi rekomendas ne eldonadi tro multe da poezio kaj belliteraturo, ĉar ĝenerale tiaj verkoj jam ekzistas en multaj lingvoj. Ekzemple, la verkoj de Shakespeare estas multfoje tradukitaj en la persan lingvon, do Shakespeare en Esperanto estas interesa kaj havinda, sed ĝi ne allogas la lernantojn ĉi tie, ĉar tion ili povas legi en la persa lingvo. Poezio jam abundas en nia lingvo, kiel ankaŭ en la lingvoj de Hindujo kaj multaj aliaj landoj, do la poezio en Esperanto ne estas tio, kio povas kapti ilian intereson. Cetere multaj perslingvaj poetoj tradukadas el aliaj lingvoj. Ĉiusemajne aperas persaj literaturaj revuoj kun tradukoj el la poezio latin-amerika, franca, angla, rusa kaj multaj aliaj. Do tio ne estas io, al kio la popolo sopiras. Sed tio, kio mankas aŭ ne estas sufiĉe havebla en nia lingvo, tio estas la literaturo scienca, teknika, ekonomika kaj simila.

D: Ŝajnas al mi, ke la financaj rimedoj por vere evoluigi tian sciencoteknikan literaturon en Esperanto povas veni nur de grandaj fondaĵoj aŭ ŝtataj instancoj. Kaj ĉar evidente la bezono ekzistas unuavice en la Tria Mondo, estus logike atendi ke de registaroj aŭ fondaĵoj en tiuj landoj, precipe en la nove riĉiĝintaj nafto-produktaj landoj aŭ en la novaj ekonomiaj potencoj kiel Japanujo, kiuj ne havas lingvajn avantaĝojn en monda skalo, venu la mono por tiu celo. Ĉu vi povas imagi, ke en baldaŭa estonteco Irano povus ludi iniciatan rolon en interregistara nivelo tiurilate?

R: Vi menciis Japanujon, kaj laŭ mia opinio ni bone povus komenci de tie. En nia regiono oni ne timas



La ŝijaisma gvidanto, lia sankta moŝto Ajatula Al-Uzama Agaje Al-Haj Sajjed Mohamed Kazim Ŝariatmadari, akceptis donace kaj kisis la Esperantan eldonon de "La Nobla Korano" kaj promesis subteni per kvanta aĉeto la verkon de ĝia tradukinto "Je la flanko de la profeto".

politikan intereson de Japanujo, kaj la japanoj mem suferas lingvan diskriminacion en la mondo. La japanoj represas multajn librojn en Esperanto, sed ili devus ankaŭ pli multe traduki bazajn studlibrojn kaj eldoni ilin. Ili havas la kapablon distribui tre efike siajn varojn de aliaj specoj, kaj ili povus fari la samon pri libroj, konstruante al si internacian libromerkaton pere de Esperanto. En Irano mi mem parolis kun pluraj el la ĉefaj eldonistoj, kaj ili estas pretaj kunlabori, sed necesas, ke iu venu al ili kun konkretaj proponoj. Necesas ia kampanjo, ia organizita agado ĉe ili. Bona ekzemplo estas la verko de Italo Chiussi *Je la flanko de la profeto*. Mi parolis kun pluraj personoj en Irano, kaj ni jam povis antaŭmendi cent ekzemplerojn. Kiel vi scias, hieraŭ ni havis aŭdiencon ĉe Lia Moŝto Ajatula Ŝariatmadari, kaj li deklaris: "Se en tiu libro estas nenio, kio kontraŭas la ŝijaisman koncepton de islamo, kompreneble ankaŭ ni povas aĉeti multajn ekzemplerojn por helpi la eldonon de tiu libro." Mi estas certa, ke de ĉiu bona libro ni povos vendi en Irano almenaŭ cent ekzemplerojn, kaj, se en aliaj landoj oni komencus tiajn movadojn por Esperanto, kiel ni faris ĉi tie, jam baldaŭ estus grava merkato. La ekonomistoj kaj la komercaj eldonejoj ankoraŭ ne konscias pri la potencialo de tiu merkato, kaj necesas atentigi ilin pri ĝi. Mi scias, ke foje venis al Irano reprezentantoj de Oxford University Press por diskuti pri kunlaboro kun la eldonejo de miaj verkoj. Ili estis

pretaj entrepreni novajn eldonojn, se ili nur havis garantion pri vendo de 500 ekzempleroj. Kial do ili ne farus same por Esperanto, se ni povus garantii al ili bazan merkaton? Tiaj komercaj eldonejoj havas eblecojn por libro-distribuo tra la mondo, kiuj estas ankoraŭ nekonataj por UEA aŭ aliaj Esperantaj eldonejoj. UEA devus kunlabori kun la landaj Esperanto-organizaĵoj por sondi la merkaton en ĉiu unuopa lando kaj por kunordigi la mendojn tiel, ke ĝi povu prezenti al tiaj gravaj eldonejoj kombinitan garantion de la merkato.

D: Mi kredas, ke vi estas iom tro optimisma pri la ĝisnuna merkato en la Esperanto-movado, sed, se ni havus eĉ nur 5 landojn kiel Irano, kie ekzistus nova merkato por, ni diru, po 100 ekzempleroj, tio jam farus signifan diferencon.

R: Eble mi estas optimisma pro la rezultoj de nia laboro ĉi tie. Eble tio estas natura reago al la videbla kresko de nia movado ĉi tie en Irano. Aliflanke mi kuraĝas opinii, ke la ĝisnuna sperto de UEA ne estas la ĝusta sperto por pritaksi tian merkaton. La libroj, kiujn oni ĝenerale eldonadis en Esperanto ĝis nun, el la vidpunkto de nia celo, estis plej ofte la malĝustaj libroj. Ni prenu kiel ekzemplon la *Koranon*. Estas belege, ke aperis la Esperanta traduko de la *Korano*, prestiĝa eldonaĵo, montrinda, komplimento al la islama mondo, pruvo pri la universaleco de Esperanto..., sed tute alia afero estas efektive vendi ĝin al islamanoj, ĉar ĉiu islamano havas en sia hejmo tradukon de la *Korano*, same kiel en kristanaj hejmoj oni jam trovas nacilingvan tradukon de la *Biblio*. Do ne ekzistas granda merkato por la Esperanta *Korano*. Ĉefe aĉetas ĝin kolektantoj, sed ilia nombro estas limigita. Alia ekzemplo estas *Esperanto en perspektivo*. Ĝi estas bona manlibro por homo de mia kalibro, kiu volas gvidi la Esperanto-movadon en sia lando kaj sekve devas esti bone informita pri ĉio detale. Sed tio ne estas verko por studento. Studento ne bezonas profundan scion pri la laŭstupa disvolviĝo de la Esperanto-movado, ne volas scii, kiu estis mal-amiko de Esperanto, kiom da homoj mortis pro Esperanto aŭ en kiu jaro estis distribuita tiu aŭ alia cirkulero por aŭ kontraŭ Esperanto. Mi ne vidas en Esperanto tiajn librojn, kiaj estas troveblaj ekzemple en la angla serio Penguin, ekzemple pri psikologio aŭ pri aliaj sociaj sciencoj — tiaj verkoj, kiajn ĉiu volas trastudi kaj konservi ĉemane kiel informlibrojn. Tiaj detalaj libroj **pri** Esperanto, kiel *Esperanto en perspektivo*, estas grava fundamento por la Esperanto-movado en ĉiuj partoj de la mondo, sed ili **ne** estas libroj, kiuj povas atingi vastan merkaton. Tion necesas konscii. Do, se mi trovas, ke vi estas iom pesimisma, tio estas komprenebla pro via sperto, ĉar ĉiam vi okupiĝis pri tiaj fundamentaj eldonaĵoj, kiuj vere estas necesaj, sed kiuj ne havas merkaton.

D: En Irano vi jam kontaktis kun registaraj instancoj, kun religiaj kaj universitataj instancoj. Ĉu vi havis kontaktojn ankaŭ kun iuj internaciaj kompanioj aŭ organizaĵoj?

R: Jes, tiajn kontaktojn mi intence ligis. Ekzemple, en Irano ekzistas kristana minoritato, en kiu estas reprezentitaj diversaj eklezioj: romkatolika, evangelia, anglikana, presbitera, luterana kaj aliaj. Por vekii ilian atenton por Esperanto, mi unue turnis min al la Biblia Societo de Irano. Montriĝis, ke ili eĉ ne scias, ke ekzistas la *Biblio* en Esperanto. Do mi petis ilin informi pri tio, kaj sekve ili devis skribi al Londono por demandi, ĉu biblioj en Esperanto estas haveblaj. Venis la respondo, ke jes, kaj tiam mi mendis 30 ekzemplerojn por vendi inter la lernantoj de niaj kursoj. Kompreneble, mi estus povinta tuj mendi ilin ĉe UEA, sed mi volis per tio atentigi ilin pri la lingvo kaj ankaŭ atentigi la centron en Londono, ke jen en Irano ekzistas merkato por la *Biblio* en Esperanto.

Krome ekzistas ĉi tie t.n. Centro de Rimedoj kaj Studoj, kiun subtenas la Evangelia Presbitera Eklezio de Usono. Tie laboras diversaj kristanaj kleruloj. Jam frue mi klopodis vekii tie interesiĝon pri Esperanto, kaj ankaŭ tie mi esperas baldaŭ instrui. Mi petis ilin kontakti kun Kent Taylor, kiu parafraze tradukis la *Biblion* en la anglan lingvon kaj per la profitoj el tiu furore disvendita traduko starigis fondaĵon por prepari similajn tradukojn en aliaj lingvoj. Mi petis, ke oni sondu, ĉu ili pretas konsideri tian parafrazan tradukon en Esperanto, kaj ankaŭ pri tio estas jam interŝanĝitaj pluraj leteroj. Mi turnis min ankaŭ al pluraj ambasadoj, petante materialojn pri aŭ en Esperanto, kaj ĵus pasintsemajne la ŝargito pri informado de la Aŭstralia Ambasado sciigis min, ke alvenis du filmoj en Esperanto el Aŭstralio kaj kvanto da libroj, kiujn mi povos pruntepreni por la kursoj. Mi anoncos al miaj kursanoj, ke ni projekcios tiujn filmojn, kaj espereble venos filmoj en Esperanto ankaŭ el aliaj landoj, kiujn ni povos montri. Ni turnis nin ankaŭ al Unesko. Ĉar niaj kursoj okazas en la Universitato de Teherano, mi instigis la vicrektoron de la Universitato skribi al la Ĝenerala Direktoro de Unesko leteron, en kiu li koncize raportis, ke konforme al la Unesko-rezolucio de Montevideo, en Irano oni organizis tiajn kursojn kun tiaj rezultoj. De Unesko venis respondo, per kiu ĝi montris interesiĝon kaj petis pli detalajn raportojn. Tiajn raportojn ni nun preparos kaj sendigos al Parizo. Mi estas certa, ke ankaŭ tiu letero helpis stimuli s-ran M'Bow akcepti la inviton de UEA ĉeesti la Kongreson en Islando.

Ankoraŭ alia tia rimedo estis la Publika Letero, kiun mi sendis en la angla lingvo al la 25-a Kongreso de la usona Esperanto-asocio ELNA. Nome, mi poste decidis tradukigi ĝin en plurajn aliajn lingvojn — en la hispanan, en la germanan, en la italan ktp — kaj por tio mi turnis min ekzemple al la Germana Preĝejo, al diversaj ambasadoj, kaj petis ilin helpi min per traduko. Mi sciis, ke ĝenerale la personoj, al kiuj mi turnis min, devos peti permeson de siaj superuloj por fari tiun traduklaboron por mi. Sed mi estis certa, ke ili faros tiun komplezon kaj ankaŭ, ke per tiu rimedo multaj personoj devos paroli pri Esperanto aŭ iel okupiĝi pri ĝi. Per tiaj metodoj mi iom post iom kreas ian internacian poŝtan trafikon pri Esperanto en elektitaj medioj.

Tiun publikan leteron kaj ĝiajn tradukojn mi mem sendis al multaj elektitaj personoj en kaj ekster Irano, al ĉirkaŭ 400 adresoj entute.

D: Kiamaniere laŭ via opinio la Esperanto-movado en aliaj landoj povas plej bone apogi vian agadon? Ĉu vi havas konkretajn proponojn por la agado en aliaj mondpartoj?

R: Por mi, kiu havas tre specifan sperton kiel profesoro kaj verkisto laboranta en la apartaj kondiĉoj de la irana movado, estas iom malfacile fari proponojn pri aliaj mondpartoj. Sed mi ja havas du sugestojn, kaj mi opinias, ke ĉiuj povas apliki ilin, kaj mi certe mem faros la samon.

Kiel vi scias tre bone, en ĉiu lando ekzistas nacia komisiono por Unesko. La rezolucio de Unesko akceptita en Montevideo pri Esperanto vere donas al Unesko la moralan devon helpi kaj apogi la movadon. Ĉiu esperantisto povas foje turni sin al sia nacia komisiono por Unesko, skribante ekzemple: "Mi legis, ke Unesko jam en 1954 akceptis jenan rezolucion pri la internacia lingvo Esperanto: ... Ĉar mi preparas artikolon (aŭ prelegon) pri tiu temo, mi petas vin afable informi min, kian sekvon Unesko ĝis nun donis al tiu rezolucio." La rezoluciotekston ĉiu povas trovi en la Jarlibro. Se en ĉiu lando venados multaj tiaj demandoj al la nacia Unesko-komisiono, ĝi estos siavice devigita turni sin al la sekretario de Unesko en Parizo, kaj tiel kreiĝos nereakta, sed forta kaj tutmonda premo al Unesko, ke ĝi okupiĝu pri tiu demando, premo tute demokrata. Neniu ŝtato mem levos tiun demandon proprainiciate, kaj Unesko mem certe ne konsideros ĝin, se neniu levos la demandon. Sed per tiu metodo ni povas krei socian premon kaj postulon.

Due, en ĉiu lando ekzistas multaj reprezentantoj de aliaj ŝtatoj: ambasadoj, konsulejoj, legacioj. Ĉiu individuo povas foje skribi al la kultura ataŝeo aŭ la ŝargito pri informado de unu aŭ alia tia reprezentanto kaj simple demandi, ekzemple jene: "Mi estas instruisto, aŭ mi verkas artikolon aŭ studon, aŭ mi preparas prelegon aŭ mi interesiĝas pri la pozicio de Esperanto en la mondo. Mi afable petas vin informi min pri la pozicio de Esperanto en via lando. Se vi disponas pri broŝuroj, filmoj, libroj en aŭ pri Esperanto, bonvolu informi min aŭ sciigi min, kie mi povas ricevi informojn pri tio en via lando." Aŭtomate la koncerna diplomato turnos sin al la eksterlanda ministerio de sia propra lando, kaj tiu siavice turnos sin al diversaj kulturaj institucioj, ekzemple al la ministerioj de kulturo aŭ edukado, al universitatoj ktp., kaj tiamaniere kreiĝos oficiala korespondado pri Esperanto, kaj en tiaj oficialaj instancoj oni konsciiĝos, ke ekzistas publika interesiĝo pri Esperanto. Sufiĉas, se ili per tio nur konsciiĝos, ke Esperanto ekzistas. Por tiu agado oni ne bezonas esti profesoro aŭ verkisto aŭ gvidanto de la movado; ĉiu ajn, kiu kapablas verki leteron, povas tiel kunlabori.

Tian agadon mi rekomendas al miaj lernantoj en Irano kaj rekomendas al la tutmonda Esperanto-movado.

Intervjuis: d-ro V. Sadler

Gemo de la monda romanaro

Recenzas Pierre Ullman (Usono):

Inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha, La, de Miguel de Cervantes Saavedra. El la hispana tradukis Fernando de Diego. Zaragoza: Fundación de Esperanto, 1977. 820p. Ilus. de G. Doré. 25cm. Bind. ISBN 84 400 3582 9.

El la legendaj tipoj kreitaj dum modernaj epokoj, la du plej famajn oni ŝuldas al la hispana literaturo: Donjuanon elpensis Tirso de Molina; Donkiĥoton, Cervantes. Tial, ni povas nun ĝoji, ke finfine aperis la Esperanta traduko de la ĉefa majstroverko en la hispana literaturo, gemo de la monda romanaro, *Don Quixote*¹, de Miguel de Cervantes Saavedra. Pluraj erudiciuloj pri kompara literaturo opinias, ke la moderna romana ĝenro en la okcidenta literaturo entenas

¹ Mi skribas la titolon per la originala ortografio, kvankam la nuntempaj skribreguloj anstataŭas tiun ikson per jo. Preskaŭ certe, Cervantes prononcis tiun literon kiel *hŝj*, kiel ankoraŭ faras la ĉilianoj. La plejparto de hispanlingvanoj nun prononcas ĝin kiel *ŝo* aŭ *ho*. Por indiki la protagoniston, tamen, mi skribos **Don Quijote**, konforme al la tradukinto, kaj la tipon mi indikos per la PIV-a ortografio **Donkiĥoto**.



Ĉi tiun recenzon akompanas ilustraĵoj de Gustave Doré.

du kategoriojn, kiuj originis en Hispanujo. Unu estas la pikareska, kiu ŝajnas esti modelo por la tipa romano de la 20a jarcento. La alia devenas de *Don Quixote*. Sed tiu opinio dependas kompreneble de la interpreto de tiu verko. Efektive, tra la tempo ĝi estas ricevinta plurajn interpretojn. La 17a jarcento lasis preskaŭ neniun komenton pri ĝi, krom konstato, ke ĝi konsistigas ĉioman satiron pri la tiama hispana socio. La 18a jarcento, epoko de la racio, rigardis ĝin precipe kiel kritikon kontraŭ manko de racio, kvankam la novklasikistoj (escepte de la hispanaj) taksis ĝian formon neracia. La romantikistoj legis ĝin romantike, tiel ke multaj nuntempaj kritikistoj ankoraŭ ne estas demetintaj ilian influon misinterpreton.

Se iu deziros reinterpreti Donkiĥoton propraguste, li faru ĝin. Tamen, nur penante resituigi la romanon en ĝiajn proprajn tempon kaj lokon, povos ni proksimigi nian komprenon al la vera aŭtoro celo. Unue, ni memoru, ke dum jarcentoj la okcidento estis dividita inter islamo kaj kristanismo, kaj ke dum preskaŭ ok el ili la Ibera Duoninsulo estis ĉiama militkampoj kaj lima lando koncerne tiujn du ideologiojn. Tiu stato finiĝis en 1492, okaze de kvar gravaj eventoj: la katolikaj gereĝoj, Isabel de Kastilio kaj Fernando de Aragono, konkeris Granadon, la lastan maŭran regnon en Iberujo; la judoj devis decidiĝi inter kristaniĝo kaj ekzilo; hispanoj malkovris Amerikon; estis eldonita la unua hispana gramatiko, rigardata kiel nemalhaveblaĵo por la ĉeflingvo de naskiĝanta popolo. Poste, en 1609, la registroj preskaŭ elradikigis islamon en Hispanujo, elpelante ĝian lastan homan vestigon, la moriskojn², pli-malpli kristanigitajn, islamdevenajn kamparanojn.

La majstroverko de Cervantes ambaŭflankas ĉi tiun jaron. *El ingenioso hidalgo don Quixote de la Mancha* aperis en 1605. En 1615 eldoniĝis ties sekvaĵo, *Segunda parte del ingenioso cavallero don Quixote de la Mancha*.³ Kompreneble, la moriskoj iĝas grava temo en la verko, ne nur pro renkonto de Sancho kun Ricote en 1615 (II, liv)⁴ kaj la tute ne probabla (kvankam ver-

² Fernando de Diego erare tradukas **morisco** per **mudeharo**. Mudeharo, tamen, estas islamano loĝanta en kristana teritorio. Morisco estas eksislamano aŭ devenanto de islamanoj, kristanigita vole aŭ nevole, sincere aŭ ne. Mudeharojn ne povis tuŝi inkvizicio, kiu rajtis okupiĝi nur pri kristanoj. Fakte, post sia elpelo el Hispanujo, pluraj moriskoj mortis kiel kristanaj martiroj en Nord-Afriko.

³ Mi kopias la titolojn precize kiel ili aperas en siaj unuaj eldonoj. Laŭ la moderna ortografio oni skribas **caballero**.

⁴ Erudiciuloj kutime indikas la ĉapitrojn en ĉi tiu verko per minusklaj latinaj ciferoj. Per I oni signas *El ingenioso hidalgo*; per II oni signas *El ingenioso cavallero*.

ŝajna) aventuro de Ana Félix (II, lxiii), sed ankaŭ ĉar El Toboso, hejmloko de Dulcinea, fantazia amatino de Don Quijote, estis vilaĝo kies tuta loĝantaro konsistis el moriskoj (fakto tiam vaste konata). Unu el la plej evidentaj ŝercoj en la verko de 1605 estas tio, ke frenezulo kredanta sin modelo de kristana kavalireco elektas kiel sian damon kamparaninon el kasto mokata kaj suspektata pri herezo. Tamen, en 1615, tiu temo estigas belan sed nekredeblan rakonton pri fantazia espero ĉe tiu kompatinda elpelita gento. Efektive, leganto de *Don Quixote* neniam scias, kie finiĝas ironio kaj komenciĝas idealo, kie troviĝas la limo inter cinika vido al la nuno kaj espero por pli bona estonto. Ĉirilate, estas notinde, ke *Don Quixote* konsistigas la kulminan influon, en la hispana literaturo, de sufiismo, mistika islama sekto kiu alproksimiĝis ironie al realeco. Tion signas eble la Cervantes-a elpenso de saĝulo, Cide Hamete Benengeli, kiel fantazia aŭtoro de la historio.

Cervantes bone konis la maŭran mondon; antaŭ ol verki sian romanon, li havis tempon grave pripensi tiun konon kaj enigi ĝin en sian mondkoncepton. *Don Quixote* (tion ni neniam forgesu) estas verkita de maljunulo, eĉ pli — de olda ekssoldato. Cervantes naskiĝis en 1547. Li eble pasigis kelkajn monatojn ĉe universitato, kaj plurajn en Italujo servante eklezian gravulon. Post nelonge, tamen, li fariĝis militisto; li heroe partoprenis en la grava marbatalo de Lepanto (1571), kie vundiĝis lia maldekstra mano. Poste, la fregaton en kiu li reiradis al Hispanujo kaptis piratoj, kiuj kondukis lin al Alĝero. Legenda estas lia heroa elteno kaj nobla sinteno dum mallibero, kiun, post kvin jaroj, finis elaĉeto, kostanta al lia familio ĝian tutan havaĵetaĉon. Je sia reveno, post pluraj penoj dungigi, li ricevis misaventurplenan laboron kiel impostokolektanto por la Nevenkebla Militŝiparo. Enkarcerigita, kiam lin defraŭdis iu, al kiu li estis konfidinta monsumon, Cervantes fine montriĝis senkulpa. Ankaŭ provis li verki porteatre, tiam nesukcese, kvankam oni nun taksas bonegaj iujn liajn dramojn. Cervantes vivis povrege, eĉ iafoje helpe de du siaj familianoj, kiuj pro malriĉo iĝis amoristinoj. Foje li edziĝis, en Esquivias, vilaĝo kie li vivis feliĉa kun sia edzino dum mallongaj paŭzoj inter provoj iel akiri vivrimedojn (malajn asertojn pri tio jam senkreditigis esplorantoj). Se li estus povinta enspezi tantiemojn el pirataj eldonoj de *Don Quixote*, ĝia aŭtoro vivus dece. Dum siaj lastaj jaroj li ĝuis protekton de mecenato.

Dum la vivo de Cervantes, Hispanujo estis la centro de la iam ajn plej granda imperio en la mondo. Ĝia reĝo regis ankaŭ Portugalujon kaj ties koloniojn, la plejparton de Ameriko, urbojn en Hindujo kaj Nord-Afriko, Filipinojn, Napolon kaj Sicilion, Frankan Graflandon kaj Baslandojn. Onklo de Filipo sidis sur la sanktarom-imperia trono. Ĉi-rezulte, la hispanoj, batalinte sukcese kontraŭ islamo, estis nun persvadataj konsideri sin popolo elektita konverti Amerikon al la kredo, daŭrigi la lukton kontraŭ islamo (tiam superregata de la turkoj), kaj purigi kristanismon de herezo militante kontraŭ protestantoj en Germanujo. Oni ankaŭ labor-

adis en Hispanujo mem por purigi ĝin de ĉiaj mahome-tanismaj kaj judismaj spuroj, per inkvizicio. Intime kunligitaj al tiu ĉi institucio, la "regularoj pri sangpureco", flanke de tradiciaj leĝoj pri nobeleco, liveris al Hispanujo duoblan kastosistemon. La malakcepto de preskaŭ ĉio muzulmana aŭ juda (speciale tio lasta), kaj de io ajn asociata kun ili; la starigo de kastaj distingo inter malnov- kaj nov-kristanoj; la timo kondukti tiel ke aliuloj eblete povus suspekti, ke oni havas judan sangon aŭ ke juda sango influas ĉe oniaj kutimoj; ĉio ĉi paralizis Hispanujon intelekte kaj materie, precipe pro la fakto, ke dum la mezepoko certajn oficojn kaj metiojn preskaŭ ekskluzive praktikis nekristanaj kastanoj. La plimulto de postenoj, honoroj, specialaj permesiloj (inkluzive de loĝpermesiloj en kelkaj urboj), gildmemberecoj, religiaj ordenoj ktp. postulis ekzamenojn pri sangpureco, t.e. esplorojn pri familiaj originoj ĝis la kvara generacio, kaj ofte plue. Kiom da funkciuloj okupiĝis pri tiaj ekzamenoj, pridemandante ekz. kamparanojn en ĉiaj vilaĝoj koncerne najbarojn kaj eksnajbarojn, oni ne povas diveni. Ĉu eble la plejparto de la tiama burokratarego? Eble ĉio ĉi klarigos la unuan



verbon de la unua ĉapitro de nia romano: "En vilaĝo de la Mancha, kies nomon mi ne volas memori, antaŭ nelonge vivis hidalgo ..." Aldone, hidalgo estis la plej malalta nivelo de nobeleco, kelkfoje aĉetebbla kiam la reĝa kaso malpleniĝis. Kiel bone perceptis Cervantes la socian ĉefmalsanon! Kompreneble, en iu ajn labirinta sistemo, mono faras miraklojn. Tamen, tiujn ekzamenojn pli-malpli kontrolis kaj preskaŭ regis la povuloj kiam ajn ili deziris, precipe post la morto de Filipo la Dua. Vidu la barblavadon de II, xxxii, kiu

konsistigas humuran alegorion pri efiko de sangpurec-ekzameno sur tri niveloj de la socio. Por la aristokrato, la afero iras sufiĉe glate; la hidalgo devas elteni ĝenan atendon; kaj sur Sancho, la malnovkristana kamparano, la "zorgantoj de la pureco" estas ŝprucigontaj malpuran akvon. Ĉi tie kaj aliloke la profunde humana percepto de la aŭtoro faras, ke la naiva Sancho plej multe akiru nian simpatian. Lia laŭkrede nemakulita deveno estas, nu, la sola afero kiu liveras al li ian superecan senton, sed tio ne helpas... Fine, li lernas defendi sin en tiu freneza mondo, kaj en 1615 lia ruzeco aŭ trompemo, akirita pro neceso, laŭgrade anstataŭas la kiĥotan frenezon kiel precipa temo en la romano.

Sed, kiom frenezas Don Quijote? Koncerne tion, beletraj amatoroj daŭrigas senfinan polemikon. Kiu estas vere freneza, Don Quijote aŭ la socio? La hiperromantikuloj dirus — la socio. Nu, kiel solvi la problemon? Eble jene: Don Quijote iom simbolas la socion; sed pro tio, kiel vivanta emblemo, li interreagas kun la iom freneza socio mem. Ja ambaŭ frenezas, sed Don Quijote pli evidente. Kiamaniere kelkaj fikciaj membroj de tiu socio reagas al Don Quijote, tio elmontras frenezajn aspektojn de la socio; sed eĉ ne la plej sagaca tiam leganto povis rimarki la tutan ironion kuŝantan en tiuj interreagoj. Fikciuloj kiuj konas la protagoniston baldaŭ taksas lin freneza, sed ili neniam povas kompreni, kiom li vere frenezas, ĉar ĉiuj membroj de tiu socio (fikcia kaj vera) neeviteble ensorbas iom de ĝia frenezo. Nur scias ĉion Urganda la Nekonata (v. p. 17-18). Aŭdinte lian retorike konfuzan diskurson pri la justa milito (II, xxvii), aŭ lian arkaikan paroladon pri "la armoj kaj la letroj" [tiel] (I, xxxviii), la ĉeestantoj rigardis lin malpli freneza ol li unue ŝajnis, dum vere tiu revivigo de plenkortintaj mezepokaj aŭ renesancaj idealoj kaj normoj plumontras lian frenezon. Efektive, la romano ofte satiras postrenesancan kvazaŭhumanismon.

Frenezo ĉe Don Quijote komenciĝas per kredo je historieco de la kavalirtemaj romanoj. Pri ili, kiel Don Quijote samopinias naiva gastejestro, kvankam "...mi klare vidas, ke nun ne okazas, kiel okazis en la antikvaj tempoj ..." (p. 242). Pro tio Dorotea flustras al Cardenio: "Ne multe mankas ke li estu la dua Don Quijote" (p. 241). Do, kie troviĝas la limo inter menssaneco kaj frenezo? Ni ne forgesu la vortojn de kastiliano en Barcelona: "Vi estas freneza, kaj se vi frenezus private kaj trans fermitaj pordoj, vi ne farus grandan damaĝon; sed vi havas la specialaĵon ŝanĝi ajnan personon, kiu traktas kun vi, en frenezan aŭ stultan" (p. 751). Vere, frenezo epidemias.

Lasante flanken problemojn de epistemologia esploro pri frenezo, ni rimarku ke multaj fikciuloj, kiuj konatiĝis kun Don Quijote en la romano de 1615, jam legis (samkiel realaj personoj) tiun de 1605, kiun ili kompreneble akceptas esti nefinita biografio de la novkonato. Do, la versimileco de la *Don Quixote* de 1615 postulas ke, legante ĝin, ni imagu la historiecon de tiu de 1605. Efektive, la *Don Quixote* de 1605 kelkaspek- te ludas en tiu de 1615 tian rolon, kian en ĝi mem



ludas la kavalirtemaj romanoj. Tial, dum nia imagpovo plongas en la libron de 1615, igante nin rigardi ĝin verŝajneca, la aŭtoro, ekspluatante nian legspertan komunecon kun siaj fikciuloj, kiĥotigas nin.

Jes ja, *Don Quixote* estas libro pri ĉiuj ni, pri nia kiĥotigemo. Kaj, ĉar libroj interalie kiĥotigas nin, *Don Quixote* temas pri libroj, libroj eldonitaj, eldonataj, neeldonataj, forgesitaj, ŝimantaj kaj brulendaj. Ĝi ankaŭ temas pri libroj kavaliraj, pastoralaj, pikareskaj ktp, pri ĉiuj ĝenroj kiuj antaŭiris ĝin kaj kiujn ĝi anstataŭis. Neforgesinde, *Don Quixote* estas ankaŭ libro kiu temas pri si mem. Aldone, la romano de 1615 eĉ temas grandparte pri apokrifa sekvaĵo de tiu de 1605, eldonita tuj antaŭ ĝi.

Sed kial ne? Ĉu tiu epoko ne plenis je apokrifajoj? Kiel montris Américo Castro, la lastaj paĝoj de 1605 konsistigas satiron pri la plej fama mistifiko tiam, la "plumbaj libroj", falsaj evangelioj "eltrovitaj" en Granada, kiuj celis plifaciligi la konvertadon de la mudeharoj, kaj ankaŭ pri falsaj tomboŝtonoj de apokrifaj sanktuloj, elfositaj en la Sacro Monte de tiu urbo. Vere, la romano de 1605 estas historiografia satiro, uzata kiel fono en tiu de 1615, kiu iel konsistigas politikan satiron.

Socia kaj politika satiro estas nedisigebla en *Don Quixote*. Verdire, ĉe ĝia fino la fikcia historiisto Cide Hamete Benengeli skribas: "mia sola celo konsistis en tio, inspiri al la homoj disdegnon kaj abomenon kontraŭ la fikciaj kaj absurdaj historioj de la libroj kavaliraj, kies prestiĝo, de kiam aperis la vera rakonto de mia vera Don Quijote, komencas ŝanceliĝi kaj sendube baldaŭ disfalos" (p. 813). Opiniante ke tiun maŭran saĝulon Cervantes kreis ironicele, mi ne povas identigi

ties vortojn kun rekta aŭtoro penso. Fakte, kiam aperis *Don Quixote*, la kavalirtemaj romanoj jam delonge estis eksmodiĝintaj. Tamen tiuj vortoj, laŭlitere celantaj la aŭtoron de la apokrifa sekvaĵo, eble ankaŭ efikas metafore, ĉar dum jardekoj la kavalira ĝenro helpis ensemi nerealisman mondkoncepton en la hispanan pensmanieron. Tiel, kvankam sufiĉe mensogaj kaj fanfaronaj je la laŭlitera nivelo, tiuj vortoj ŝajnas veraj transcende. Sufiisma arto! Jes ja, kvankam plena je humuro, patoso, fascinaj priskriboj, neforgeseblaj personoj kaj situacioj, la libro posedas nemezureblan transcendan valoron. Kaj pertranscende ĝi prezentas la jenan demandon: Kiam kaj kiel fariĝas malrealecaj la idealoj unuigintaj kaj movantaj la socion?

Jam estas menciita tio, ke nia aŭtoro militis en Lepanto, batalo pri kiu la Papo petinsistis ĉe ĉiuj kristanaj princoj, ke ili helpu neniigi turkan potencon en Mediteraneo. La juna Cervantes aliris la aferon kun fervoro. Sed multajn jarojn poste, kiam sinkis la Nevenkebla Militŝiparo, por kiu li kolektis impostojn, li eble ekkomprenis la realpolitikon de la francoj, kiuj spite al sia kristaneco amikiĝis kun Turkujo. Aldone li konstatis, kiel lia patrujo verŝadas sangon kaj oron en la Flandran Militon, daŭrantan jardekojn, por unue ekstermi protestantismon en la nordo, poste por reteni la katalikan sudon. Don Quijote, samkiel Hispanujo, bataladis ideologie. Sed Hispanujo ne estas la sola potenco kiu iafoje kredis je ia evidenta memdestino kiel mondpolicano.

Dum la vivo de Filipino la Dua, kiu iom partoprenis tian kredon, oni probable ne estus permesinta la eldonon de *Don Quixote*. Post lia morto en 1598, okazis cenzura malstreĉo, floris realisma beletro, lasante tiun admirindan popolon belege esprimi sian tragedion. Plej bone ĝi estas esprimita per *Don Quixote*, kies protagonisto volas revenigi pasintecon, plejparte fantazian mezepokon, kiu jam ne povas ekzisti. Kiuj kredas je laŭgrada progreso, tiuj etikedos lin reakciulo. Sed ni ne forgesu, ke la mezepokon en Hispanujo karakterizis konsiderinda klasa suprenirebleco (kaŭze de konstanta batalado), iela sendependeco kaj religia toleremo, difference de aliaj landoj. Kiam aliaj potencoj fine fariĝis pli toleremaj, Hispanujo fariĝis mala. Ja tragedia estas la ofta elfaziĝo de tiu lando rilate al siaj najbaroj. Formale, *Don Quixote* montriĝas kiel mirinde strukturita artaĵo, ekzakte planita ekde la komenco (spite al la opinioj de iuj miskomprenantoj). Miaopinie, la romano de 1605 estas manierisma, kaj tiu de 1615 baroka. La unua strukture disvolviĝas rilate tri manifestiĝojn de koncepto pri heroismo: (1) la heroo, la kaptito (I, xxxix - xli), kiu heroe penas konservi sian denaskan honoron; (2) la burleska heroo, Don Quijote; kaj (3) la malheroo, la nedeca scivolanto (I, xxxiii-xxxv), perdanta proprakulpe sian denaskan honoron. Evidente, la Cervantes-a ideo pri la malheroo tute malsamas al la pikareska, laŭ kiu la protagonisto, naskiĝinta kun malhono, povas nek demeti ĝin iam, nek akiri honoron. En ĉi tiu pesimisma vidpunkto Cervantes preskaŭ neniel partoprenis. Cervantes unue enfokusigas honoron, ne malhonoron.



(La rilato inter la nedeca scivolanto kaj Don Quijote similas la kontraston de freneza sciencisto kaj religia fanatikulo, ĉar nedeca scivolemo estas fanatikeco ne pri fido sed pri scio.) Tiu triobla priheroisma temfokuso faras, ke la romano posedas centron kie tute mankas heroaj aventuroj (I, xxxvi-xxxviii). En tiu aranĝo jam kuŝas sufiĉe manierisma arto. Sed aldone, la libron de 1605 flankas humuraj poemoj (majstre tradukitaj!). La komencajn verkis fikciuloj relevitaj el kavalirtemaj romanoj, fare de la ĉiopova aŭtoro, por ke ili juĝu sian propran karikaturon, kiun, kompreneble, ili ne povas koncepti tiele. La finajn komponis akademietanoj kiel epitafiojn por la protagonisto multe antaŭ ties morto (ni jam vidis, ke per tiuj epitafioj Cervantes ankaŭ mokas certan mistifikon). Tiuj relevo kaj mortanticipo konsistigas retro- kaj ĉirkaŭ-kurbiĝon en la literatur-historia kontinuaĵo, do, manierisman efekton.

La strukturon de la verko el 1615 generas la kuniĝo, disiĝo, rekuniĝo kaj intelekta interpenetrado de Don Quijote kaj Sancho, kun barokaj antaŭenpuŝo kaj apertiganta movo.

Ĝenerale, la libro bone tradukeblas, sed ne ĝia titolo. **Ingenioso** tradukiĝas kiel sprita (la ĉefa intelekta virto dum tiu penskontrola epoko) sed ĝi ankaŭ signifis tendencon al humorperturbo (vidu *Examen de ingenios*, de Juan Huarte de San Juan (1575), kies ideoj multe influis Cervantes-on rilate la priskribojn de la kiŭota karaktero, disvolviĝanta de kolera al melankolia). **Hidalgo** kaj **don** ne kongruas, ĉar por porti la titolon **don** oni devis esti almenaŭ kavaliro; do tiu ŝerca nekongruo indikas la kvazaŭ memfaritan plialtrangigon

de la protagonisto (realaĵe, la burleska kavaliriga ceremonio en la gastejo estus tiutempe konsiderata sakrilegia kaj tute kontraŭleĝa). **Quixote** (france **cuissard**; angle, **cuish**) estas kirasero ŝirmanta femuron. **Mancha** ja estas provinco kie loĝas nia heroo, sed tiu vorto ankaŭ signifas makulon, ĉu ene de la femur-kirasero, eble pro urino aŭ feko de timigita kavaliro, ĉu sangmakulon, t.e. judan aŭ maŭran devenon.

En la romano, tamen, tiu kiu fekas pro timo estas la malnovkristana kamparano Sancho (I, xx). En tiu ĉapitro Don Quijote, la freneza idealisto, volas antaŭeniri nokte en brua arbaro. La tiam materialisme simbola Sancho, ne tiel kuraĝa, ŝnurligas la antaŭajn krurojn de lia ĉevalo kaj, ankoraŭ time brakumante la maldekstran kruron de sia mastro (kiu senmove sidas sur la ĉevalo), faligas sian pantalonon kaj kaŭras por feki, eligante odorojn, kiuj atencas la kavaliran nazon. Kiam idealisma flanko de socio fariĝas freneza, la materialisma malatentas ĝin kaj produktas nur ĉiepenetran korupton!

Koncerne la majstran tradukon de Fernando de Diego, oni povas nur laŭdi lian lingvaĵon, ĉar ĝi estas vere eleganta. Domaĝe, li uzis malbonan eldonon, bazitan sur la fuŝa de la Reĝa Akademio el la 18a jarcento. Tiuj akademiaj seriozuloj ne komprenis, ke tio, kio en ironia verko ne estas racia, povus eble esti almenaŭ intenca. Ili forigis la dividon je kvar partoj, faritan de Cervantes en la romano de 1605, kaj ŝanĝis la blagajn titolojn de ĉapitroj x, xxxv kaj xxxvi (efektive, la akademiane nekompreneitaj aŭtoraj blagoj parte respondas al historiografia satircelo). Rezulte, en la Esperanta eldono oni trovas, inter aliaj miserudiciaĵoj, notojn kiel tiun de p. 103: "**kies dua parto finiĝas ĉi tie** — Cervantes ne difinis al si, ĉe la komenco, la longon kaj strukturon de *Don Quijote*." Same bedaŭrinda estas la klarigo pri la azen-malaperero, kiu okupas plejparte paĝon 164. Ĝi ne troviĝas en la unua eldono (sed ja en la dua) kaj laŭ kelkaj erudiciuloj Cervantes ne verkis tiun sekcion. La aŭtoro verŝajne volis lasi tiun malaperon en mistero,



eble parodiante la misteron pri Elisabat kaj Madásima (p. 175). Same missciiga oni trovos la enkondukon de la tradukinto, kiu ripetas pri Cervantes kaj liaj celoj teoriojn jam anstataŭigitajn fare de nuntempa erudicio. Malgraŭ ĉio, tiuj detaloj koncernas nur spertulojn. Fizike bela — tute meritita vesto por tiel bonega traduko —, staras la eldono, kiun ilustras dudek gravuraĵoj de Gustave Doré. Kvankam tre bonaj hispanaj artistoj pentris plurajn, precipe dum la dekoka jarcento, fremdaj artaĵoj atestas pri la intereso, kiun la romano elvokis en multaj landoj kaj ĉiuj epokoj.

Mendu ĉe UEA: 62,70 (por Nederlando 65,21) gld., plus sendokostoj 10%.

ESPERANTO-DOKUMENTOJ ESPERANTO DOCUMENTS DOCUMENTS SUR L'ESPERANTO

La unuaj dokumentoj en la nova franclingva serio nomiĝas "*Espéranto et écoles européennes*" kaj "*L'Espéranto et l'Association Universelle d'Espéranto*"; la plej freŝaj dokumentoj en la Esperanta serio titoliĝas "*Esperanto kaj la pliaĝuloj*" (I. Gál) kaj "*Esperanto: Ĉu eŭropa aŭ azia lingvo?*" (Piron); dum en la anglalingva serio la laste aperinta dokumento nomiĝas "*Esperanto and the Universal Esperanto Association*". Abono por 10 sinsekvaj dokumentoj en unu el la serioj kostas 27,50 gld. La abonojn akceptas ĉiuj kotizperantoj de UEA kaj, kompreneble, ankaŭ la Centra Oficejo de UEA.

Ĉi tiu eldonaĵo de UEA jam stabiligās: En du jaroj aperis entute 24 kajeroj, en tri diverslingvaj serioj. En la anglalingva serio aperis 12 dokumentoj, en la Esperanta 10, kaj en la ĵus lanĉita franca serio 2 dokumentoj. Ĉio ĉi signifas, ke estas tempo reaboni aŭ ekaboni unu el la serioj. Ne atendu elĉerpiĝon!

KEJA kaj ĝia vojo


PAROLI pri la membronombro de TEJO estas incita temo, precipe kiam oni klopodas difini la membrecon laŭ la samaj kriterioj, kiuj validas por la aneco ekz. en UEA. Ke temas pri iom aliaj organizaj ligoj, tion montras ankaŭ la informo, ke Kroatia Esperantista Junulara Asocio (KEJA), kiu estas nur parto de Jugoslavia Esperantista Junulara Asocio (JEJA), havas 2 500 membrojn. Ni legis tiun informon en la bulteno (n-ro 7/77) de la Respublika Konferenco de Socialista Unuiĝo de la Junularo de Kroatio (SUJK), kiu siavice estas milionmembra junulara movado, liganta — kiel tegmenta organizaĵo — ankaŭ ĉiujn fakajn kaj specialigitajn junularajn unuiĝojn en tiu parto de Jugoslavio. Ni en la Movado trovas tiun membronombro surpriza kaj nekonata, sed la junulara organizaĵo de Kroatio scias plurajn aliajn detalojn pri tiuj 2500 membroj de KEJA: 51,2% de ili estas lernantoj en la elementaj lernejoj, 31,9% estas mezlernejoj, 8,4% studentoj, 3,6% laboristoj, 0,31% kamparanoj, ktp.; 10,5% estas vilaĝanoj dum 89,5% vivas en la urboj. Se ni en la Movado ne sukcesas eĉ registri la nombron de niaj adeptoj, tio ja — feliĉe — ne signifas, ke ili ne ekzistas.

La detaloj pri la membronombro de KEJA ne estas la plej interesa novaĵo el la menciita bulteno. Inter la konkludoj de komuna kunsido de la gvidantaroj de la du organizaĵoj (la esperantista kaj la ĝenerala), oni legas ankaŭ ĉi tiajn konstatojn kaj decidojn: "Estas komuna tasko de ĉiuj sociaj organizaĵoj, do ankaŭ de KEJA kaj SUJK, en la sekvanta periodo eltrovi la eblecojn de pli konvena financado de KEJA..." "Pro la amasiĝo de la organizaĵo kaj pro la pligrandiĝo de la agadskalo de KEJA, necesas eltrovi ankaŭ rimedojn por profesiigo de unu gvidanto de KEJA." "Estas necese, ke ĉiuj bazaj organizaĵoj de SUJK, en kiuj ne ekzistas organizita aktiveco de KEJA, esploru eblecojn kaj bezonojn por formiĝo de tia organizaĵo. . . Post la analizo de eblecoj kaj bezonoj por formiĝo de bazaj organizaĵoj de KEJA, komunumaj konferencoj de SUJK devas ekformi iniciatajn komitatojn kaj krei laborkondiĉojn (ejojn, materialojn ktp)." Listiĝas poste decidoj pri organizo de Esperanto-kursoj en ĉiuj junularaj labor-tendaroj en Kroatio, eldono de informa broŝuro pri KEJA, ktp.

Se "traduki" tiun organizan lingvaĵon en la kutiman movadan lingvon, ĉio ĉi signifas jenon: La ĝenerala junulara organizaĵo de Kroatio konsideras la laboron de KEJA esenca komponanto de la junulara eduko, inter kies celoj estas ankaŭ internaciismo. Tial la amasa organizaĵo prenas la laboron de KEJA kvazaŭ sian propran zorgon kaj pretas ĝin helpi morale kaj materie.

Siavice tio signifas, ke ĝi helpas populariĝon kaj disvastiĝon de la Internacia Lingvo.

Troviĝos en la Movado la kutimaj starigantoj de la ĉiamaj demandoj pri "memstareco" de KEJA, kiu jen intime kunlaboras kun soci-politika organizaĵo. Kvan-kam tio ĉiam estis kaj restu la demando de KEJA mem, ni diru, ke la orientiĝo de KEJA estas pli ol ĝusta. Socia izoliteco neniam estis signo de memstareco sed nur de falsaj imagoj pri propraj ekzisto kaj graveco. KEJA fariĝas parto de la socio en kiu ĝi vivas. Tio estas pre-miso por agi favore al Esperanto en tiu socio. **sm**



Pitoreskecon de aliaj lokoj oni devas aserti, tiu de Veliko Tarnovo, urbo de la 34a IJK, estas evidenta (v. la foton).

34a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO de TEJO, 1978 07 22 – 29, Veliko Tarnovo, Adreso de LKK: Poŝtkesto 587, BG-1000 Sofia C, Bulgario. Konstanta adreso: CO de UEA/TEJO.

APERIS la unua informilo (kun aliĝilo) de la 34a IJK. Vi povas peti ĝin ĉe unu el la du ĉi-supre indikitaj adreso. Aliĝantoj el la landoj ekster la Orienta Eŭropo povas pagi sian aliĝkotizon al UEA (v. la bankan kaj poŝtan kontojn dorse de la kovrilpaĝo de ĉi tiu revuo). Ĝis la fino de februaro 1978 validas jenaj kongreskotizoj: por kongresanoj ĝis inkluzive 20-jaraj 157,00 guldenoj (62 levoj); por 21–25-jaraj 177,00 gld. (70 levoj); por 26–32-jaraj 197,00 gld. (78 levoj); por 33-jaraj kaj pli aĝaj 222,00 gld. (88 levoj). Individuaj membroj de UEA/TEJO ĝuas rabaton de 12,00 gld. aŭ 5 levoj. **Rapidu aliĝi, ĉar la 1-an de marto la kotizoj estos konsiderinde pli altaj.**



Kongresa Komunikilo

**63a UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO, Varno (Bulgario)
1978 07 29 – 08 05**

**Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.**

**Adreso de la Loka Kongresa Komitato: Bul.
Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofia, Bulgario.**

Unua Bulteno provizore elĉerpita: Oni bonvolu iom pacienci pri mendoj por la Unua Bulteno de la 63a UK, ĉar ĝi jam en novembro elĉerpiĝis kaj en Roterdamo kaj ĉe LKK. Oni strebas aranĝi fruan represon. Eldonkvanto de la unua preso estis dudek mil.

Renkontiĝoj kun kongreslandaj samfakuloj: Iuj kongresanoj havos la eblecon kontakti kun bulgaraj samfakuloj ĉe specialaj akceptoj, kiujn nun aranĝas LKK kune kun lokaj fakaj instancoj. Tre probable okazos tiaj renkontiĝoj kun bulgaraj virinoj, sciencistoj kaj ĵurnalistoj, kaj eble ankaŭ kun kuracistoj kaj instruistoj.

Esperantologia konferenco: Centro por Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) organizos en la kadro de la 63a UK internacian konferencon pri esperantologio, kun la celo resumi per prelegoj kaj/aŭ seminario la nunan staton de esperantologio kaj montri la direkton de estonta esplorado. Estas projektataj prelegoj pri la valoro de Esperanto por la moderna lingvoscienco; la nuna stato de la scienca analizo de Esperanto; la direkto, laŭ kiu la Internacia Lingvo evoluas; Esperantaj terminologioj ktp. Personoj pretaj kontribui al la Konferenco kontaktu d-ron Detlev Blanke (Wollinerstr. 13/14, DDR-1058 Berlin, Germana DR), prefere antaŭ la fino de januaro.

Rapido por Belartaj Konkursoj: Alproksimiĝas la limdato por la Belartaj Konkursoj. Kiel lastjare, la branĉoj estos originalaj prozo, poezio kaj dramo; originala eseo (Premio Luigi Minnaja, kiu konsistas el la jara rento de 4 000 guldenoj tiucele donacitaj de la familio Minnaja); kaj fotografio. Por ĉiuj branĉoj krom fotografio, konkursoj devas atingi la sekretario de la Belartaj Konkursoj (s-ro Alec Venture, 7 Grosvenor Rd., Wallington, Surrey SM6 0EG, Britio) ĝis la 31a de marto. Konkursajn por la fotografia branĉo sendu al Foto-Konkurso, p/a Loka Kongresa Komitato, kien ili venu ĝis la 30a de junio 1978. Detalajn regulojn vidu en la libreto *Statuto kaj Regularoj de UEA*, kun ŝanĝoj laŭ p. 164 de *Esperanto*, oktobro 1976.

Finfine infankongreseto! Post dujara prokrasto, en Varno okazos la 16a Internacia Infana Kongreseto por esperantistoj 6- ĝis 13-jaraj. Tre probable la kongreseto estos moderna elementa lernejo piede atingebla de la Palaco de Sporto kaj Kulturo, kiu estos la ĉefa ejo de la 63a UK. Aliĝilo eldoniĝos en januaro kaj estos havebla ĉe la konstanta adreso de la UK. Esplorata estas la ebleco de infanvartejo por pli junaj infanoj, kun tre malalta aŭ tute sen kotizo sed kun labordivido inter la koncernaj gepatroj. Kiuj interesiĝas pri tio, bonvolu skribi al la konstanta adreso de la UK.

Blinduloj en Varno: La 46a Kongreso de Blindaj Esperantistoj okazos samloke kaj parte samtempe kiel la Universala Kongreso. Aparta loĝejo estos rezervita por blinduloj kaj akompanantoj. Laŭ nunaj planoj la blindula kongreso okazos proksimume ekde la komenco de la UK kaj daŭros unu semajnon pli longe.

Tuttago al Rumanio: Detala ekskursprogramo, kun prezoj, aperos en la Dua Bulteno. Intertempe oni notu, ke inter la tuttagaj ekskursceloj estos la rumana urbo Mamajo kaj la antikva ĉemara bulgara urbo Nesebro.

Varno ĉe la nigramara bordo estas unu el la ĉefaj centroj de la bulgara turismo, kiu dum la lastaj jaroj spertis furoran populariĝon inter la eŭropaj feriantoj. La kongresurbo de la 63a UK ŝuldas tiun populariĝon al siaj beleco, klimato kaj nivelo de la turismaj servoj kontraŭ relative malaltaj prezoj.





Mezepoka preĝejo en Nesebro, unu el la ekskursaj celoj.

Preparataj estas ankaŭ antaŭkongreso en Vraco kaj postkongresa ekskurso de Varno tra Plovdivo al Smoljano, kun komuna foriro al Sofio je la fino.

Loĝado en kaj ekster Varno: Loka Kongresa Komitato sukcesis rezervi por la UK multajn litojn en Varno, por ke kongresanoj ne devu veturi ĉiutage de la hoteloj de la apudaj strandoj Zlatni Pjasaci (Oraj Sabloj) kaj Drujba (Amikeco). Rezervilo por enurba hotelĉambro aperos kun la Dua Bulteno, kiel ankaŭ por loko en amasloĝejo, kiu situos same en Varno. Tiuj, kiuj preferas iom veturi ĉiutage kaj ĝui la marbordon, povas mendi ĉambron en unu el la multaj ĉestrandaj hoteloj pere de sia loka vojaĝagentejo. Tiajn lokojn **ne** peros

LKK. La kongresa programo ja verŝajne havos longan tagmezan paŭzon, kiel en Ateno antaŭ du jaroj, por ke oni povu plene ekspluati la marbordon. Ankaŭ mendilo por kongressemajna aŭtobusbileto aperos en la Dua Bulteno.



Varbu kongreslibrajn reklamojn: La Kongresa Libro estas ĉiujare inter la plej gravaj porokazaj eldonaĵoj Esperantaj. Movadaj entreprenoj povas tie reklami je tre favora tarifo: 200 gld. por tutpaĝa reklamo interna, 115 gld. por duonpaĝa, 70 gld. por kvaronpaĝa. Varbantoj de reklamoj de entreprenoj neesperantaj povas ricevi makleraĵon ĝis 30% de la prezo. Interesitoj petu tarifon, mendilon kaj specimenojn ĉe la konstanta adreso de la UK.

Karavanoj kaj kongresperantoj: Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista organizas aŭtomobilan karavanon al Varno. Interesitoj kontaktu la ĝeneralan sekretarion de IEKA, s-ro Jean Guillaume, 66 Village de Grasse, F-78810 Feucherolles, Francio.

Interesitoj pri karavano el Francio bonvolu sin anonci al Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris.

Karavano de Frankfurto ĝis Varno kaj reen estas aranĝo de Esperanto-Centro en Paderborn, kiu fariĝas por la 63a UK ankaŭ kongresa kotizperanto por karavananoj. (Aliaj aliĝu ĉe la kutima kongresperanto en FR Germanio, s-ro M. Klünder.) Esperanto-Centro en Paderborn peros ankaŭ vojaĝojn al Veliko-Tarnovo (urbo de la 34a IJK) kun aŭ sen pluiro al Varno. Interesitoj skribu al Esperanto-Centro, Grunigerstr. 5, D-4790 Paderborn, FR Germanio; pĉk. Hannover 259658-301, bankkonto Volksbank Paderborn (BLZ 472 601 21) n-ro 882 0770 001.

Danaj kongresanoj bonvolu noti, ke la poŝtĉekonta numero de nia peranto s-ro Gustav Kühlmann lastatempe ŝanĝiĝis. Ĝi estas nun 4315499.



Multaj kongresanoj de la 63a UK loĝos en Zlatni Pjasaci (Oraj Sabloj), unu el la plej belaj kaj modernaj bulgaraj feriejoj.

Germana DR

- La 11an kaj 12an de marto 1978, Leipzig-a Laborrondo Esperanto (Leipziger Arbeitskreis Esperanto, Käthe-Kollwitz-Str. 115, DDR-701 Leipzig) aranĝos internacian foiran esperantistan renkontiĝon sub la nomo "IFER '78". Oni antaŭvidas



prelegojn, prezenton de Pola Esperanto-Teatro, distran vesperon, kvizon ktp. La aranĝo ligiĝas al la samtempa internacia foiro de Leipzig.

Ekvadoro

- En nia junia numero pasintjare (p. 118) ni raportis pri la unuaj signoj de Esperanta agado en ĉi tiu sudamerika lando. Fine de oktobro 1977, s-ro Henrik Karlsson (Svedio) vojaĝis turisme al Ekvadoro kaj renkontiĝis kun kelkaj esperantistoj en la ĉefurbo Kito, por kiuj tio estis la unua internacia movada kontakto. Laŭ aliaj informoj ŝajnas, ke en la Centra Universitato de Ekvadoro fondiĝis Esperanto-klubo kaj funkcias nova kurso.

Luksemburgo

- En la nova eldono de la prestiĝa *Marienkalendar*, kiu aperas jam cent jarojn en Luksemburgo, troviĝas du-paĝa raporto (kun ilustraĵoj) pri la laboro de Luksemburga Esperanto-Asocio. La kalendaro aperas en la germana lingvo.

Venezuelo

- Laŭ raporto de prof. J.E. Bachrich, en oktobro okazis du pliaj intervjuoj pri Esperanto en la venezuela televido. Intervjuiĝis inĝ. Felix García Blazquez, redaktoro de *Vene-*

zuela stelo, prof. J. Mosonyi kaj s-ro R.E. Díaz Villalobos, aktivulo de la Universitata Esperanto-Centro, fondita antaŭ kelka tempo en la venezuela ĉefurbo. Alia intervjuo okazis sammonate en la ĉefa radioprogramo, denove kun prof. Mosonyi, vicprezidanto de Venezuela Esperanto-Asocio. Estas grave noti, ke en la jaro 1977 en la venezuelaj amas-komunikiloj okazis pli da raportado pri Esperanto, ol dum multaj antaŭaj jaroj kune en tiu lando.

Islando

- Por kontentigi la grandan interesiĝon pri Esperanto, kiun vekis i.a. la 62a Universala Kongreso en Rejkjaviko, Islanda Esperanto-Asocio ĵus tradukis kaj adaptis por islandlingvanoj la britan radio-kurson de Esperanto, *Jen nia mondo*, pri kiu ni amplekse raportis en nia mar-ta numero pasintjare.

Irano

- Meze de novembro 1977, en plia supera lernejo en Teherano komen-

cigis la instruado de Esperanto. Temas pri la Altlernejo Ŝemiran, kie ekinstruis s-ro Badiollah Samimy, universitata instruisto, delegito de UEA en la irana ĉefurbo. Tie la Internacian Lingvon lernas pluraj dekoj da studentoj kaj profesoroj. La kostojn de la instruado pagas la lernejo.

Svislando

- La svisa Movado, iom disduigita (simile al Aŭstrio kaj Brazilo), lastatempe, tamen, montras signojn de plena aktiveco. Al la vigliĝo de Svisa Esperanto-Societo kontribuas jam tre bone progresintaj preparoj por la 64a UK en Lucerno venontjare. Kultura Centro Esperantista okupiĝas pri instruado, eldonado kaj informaj laboroj. Novaĵo estas Svisa Esperanto-Junularo, en kies sino antaŭ iom da tempo naskiĝis teatra trupo "Vagabondoj", kiu debutis en oktobro, dum renkontiĝo en Bazelo.

Ĉinio

- La Esperanta revuo *El Popola Ĉinio* malofte publikigas informojn pri la Esperanto-movado. Tamen, en ĝia numero por decembro 1977 aperis artikolo de Baldur Ragnars-son pri la 62a UK en Rejkjaviko.

Fake



- Interlingvistiko: Inter la 24a kaj 27a de novembro 1977, Instituto por Kibernetika Pedagogio en Paderborn (FR Germanio) aranĝis sian duan labor-konferencon (la unua okazis en novembro 1976). La temo de la ĉi-foja konferenco estis "Interlingvistiko en scienco kaj klerigo". Partoprenis kelkdeko da sciencistoj kaj konataj figuroj el la Esperanto-movado. Nia foto (farita de D. Smolić) montras parton de la konferencanoj, kun prof. I. Szerdahelyi (dua de maldekstre) preleganta.

Literaturo

• Ĵus aperis 538-paĝa *Slovaka antologio*, en la elekto de Jozef Vel'ký, traduko de sep elstaraj esperantistoj, kaj sub la redakto de d-rino Magda Šaturová-Seppová. La belan binditan volumon eldonis Slovaka Pedagogia Eldonejo en Bratislavo, kun eldonkvanto de iom malpli ol 3000 ekzempleroj. Ni esperas baldaŭ recenzi la verkon; ankaŭ la Libroservo de UEA post nelonge proponos ĝin al siaj klientoj.

Lingvo-problemo

• Dum la romkatolika Sinodo, en oktobro 1977, en Romo, 204 ekleziaj altranguloj dividiĝis en 11 diskutrondojn, starigitajn ne nur laŭ temoj, sed ankaŭ laŭ lingvoj. Funkciis tri anglalingvaj rondoj, tri por la parolantoj de la hispana kaj portugala, du por la franca, dum po unu rondo diskutis en la germana, itala kaj latina lingvoj. Grave estas noti, ke la diskutrondon en la latina — lingvo kiu dum jarcentoj dominas en la eklezio — partoprenis la plej malgranda (12) grupo da sinodanoj. Kvankam la latina restas la sola oficiala lingvo en la plensesio de la Sinodo, eĉ tie multaj episkopoj parolis en la angla aŭ la franca. Samtempa interpretado en la latinan provokis plendojn pro malbona kvalito.

Periodaĵoj

• *Eŭropa dokumentaro* (v. nian numeron de aprilo 1977, p. 61) spertas problemojn pro la manko de sufiĉa nombro da abonantoj. Fine de novembro venis eĉ komunikado, ke la revuo ne plu aperos en 1978. Tamen, meze de decembro la krizo solviĝis: *Eŭropa dokumentaro* aperos ankaŭ en ĉi tiu jaro. Ĝia kuneldonanto fariĝos Eŭropa Klubo el Paderborn (FR Germanio), kiu decidis helpi al la iniciatinto de la revuo, Centro por Eŭropa Edukado en Bruselo. La revuo estas abonebla ankaŭ ĉe UEA kontraŭ 15,00 (por Nederlando 15,60) guldenoj.

Studentoj

• Antaŭ kelka tempo fondiĝis Esperanto-grupo de la Teknika Universitato en Berlino. Similaj grupoj jam funkcias la universitatoj de Bonn kaj Würzburg, kie lastatempe komenciĝis novaj Esperanto-kursoj. Novan kurson en Bonn gvidas hinda studento Yashovardhan.

DE LA 19a ĜIS LA 25a DE FEBRUARO:



Amikeco trans limoj

Multaj kluboj kaj unuopuloj jam pretiĝas por la ĉi-jara Semajno de Internacia Amikeco. Ankoraŭ restas tempo, por ke ankaŭ vi faru preparojn por la ĉi-jara priatento de tiu bela kaj nobla iniciato de UEA. La Semajno estas ideala okazo por vaste informi pri la Internacia Lingvo kaj atingi ĝojojn en la internacia amikeco helpe de Esperanto. Relegu pri tio artikolon en nia pasintjara januara numero (p.5).

Semajno de internacia amikeco

Muziko

• Meze de septembro 1977, en Brno (Ĉeĥoslovakio) koncertis la itala kantĥoro el Monte Pasubio. La italaj kantistoj gastis ĉe la koruso "Foerster" el Brno. En ambaŭ muzikaj ensembloj troviĝas esperantistoj, kiuj organizis la vojaĝon de la italoj al Brno. Ĉi-jare sekvis vizito de la koruso "Foerster" al Italio.

Ŝako

• Esperanta Ŝak-Ligo Internacia, kunlaboranta faka asocio de UEA, antaŭ nelonge organizis sian unuan korespondan team-turniron, kiun partoprenis 11 triopoj el 9 landoj. La unuan premion gajnis la teamo Ĉeĥoslovakio I, antaŭ Nederlando kaj Jugoslavio. Sekvis: Ĉeĥoslovakio II, Finnlando, FR Germanio, Francio, Pollando, Germana DR, Ĉeĥos-

lovakio III kaj Soveta Unio. La sukceso estis tiel granda, ke intertempe jam komenciĝis dua turniro, ĉi-foje kun 21 kvaropaj teamoj, kiuj ludas en tri grupoj. Estas interese, ke Rumanio, lando sen organizita Esperanto-movado, partoprenas la turniron pere de du teamoj.

Komencantoj

• Esperanto-klubo el Hamburgo (FR Germanio) intencas organizi la vojaĝon de 26 siaj junaj lernantoj de Esperanto al la Kulturdomo Grésillon (Francio) en la semajno inter la 8a kaj 15a de aprilo. Oni alvokas ankaŭ aliajn klubojn, kun porjunulaj kursoj, fari la samon, tiel ke la kursanoj rapide spertu la valoron de rektaj internaciaj kontaktoj. (Vidu anoncon pri Grésillon sur la kovrila paĝo de ĉi tiu numero).

Persone

Egami

• Prezidanto de Japana Esperanto-Instituto (JEI) prof. d-ro Fuĵio Egami, kiun UEA antaŭ nelonge elektis en sian Honoran Patronan Komitaton, ceremonie inaŭguris la laborojn (v. la apudan foton) por la konstruado de la nova sidejo de JEI. La solenaĵo okazis la 12an de novembro 1977 en Tokio. Kiel ni jam skribis (v. nian novembran numeron, p.189), la nova sidejo de JEI estos granda kvaretaĝa domo, kies kapacitoj pozitive influos pluan evoluon de la Esperanto-movado en Japanio. La domo finkonstruiĝos dum 1978.



ŜANGITAJ ISRAELAJ KOTIZOJ

Pro devaluto de la israela pundo, necesis ŝanĝi la kotizojn de UEA por Israelo por 1978. La nova tarifo estas jena: MJ(-K) 110, MA(-K) 275, SA 165, Kontakto 85, SZ 550 is.p.

SOCIETO ZAMENHOF 1978

BELG: 7 E.L.M. Wensing; 8 Germain Pirlot; 9 Gustaaf Goossens; 10 C. Vanbiervliet; 11 Germaine Wolff. BRAZ: 12 Delio Pereira de Souza. DANL: 13 P.O.P. Andersen. FINN: 14 Veikko Tikkanen. FRANC: 15 Fernand Charlet; 16 Yvette Viernes. FRG: 17 Harry Bily; 18 Marie Laade; 19 Adolf Mosch. NED: 20 L. Adelaar; 21 Lawrence Mee; 22 E.S. Otto; 23 G.M.J.B. Peet; 24 Cornelis Zondervan; 25 J.S. Rooke; 26 W. Rodenhuis. SVED: 27 Rolf Nordström. SVISL: 28 Frieda Welter; 29 Walter Sonderegger; 30 Alice Eberhard. US: 31 Wm. R. Har-

mon; 32 William Solzbacher; 33 R. Kent Jones; 34 Adrian Hughes.

DONACIOJ 1977 (Gld)

ĝis la 30a de novembro

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: FR Germanio: H. Welger 107,41. Sumo ĝisnuna: 1490,70.

FONDAĴO CANUTO: Danlando: G. Jørgensen 56,55. Nederlando: Frisa Esperantista Rondo 50,00. Sumo ĝisnuna: 6254,08.

ĜENERALA KASO: Belgio: A. Mertensgoossens 3,82. FR Germanio: M. Gründler 37,71; K. Simon 21,60. Nederlando: D.J. Peereboom 0,88. Sumo ĝisnuna: 5659,37.

PATRONAJ MEMBROJ DE TEJO 1977: 22 H. Gimeno, Hispanio.

UNESKO-KAMPANJO: Francio: C. Fernand 140,70; R. Perault 40,00. Japanio: H. Shinoda 250,00. Nederlando: R. Slot 250,00. Svedio: E. Carlén 239,68. Svislando: D. Bertolini 46,10; P. kaj B. Schaufelberger 109,75. Usono: H. Goodman 241,00. Sumo ĝisnuna: 6646,89.

la eseo, kiun Zamenhof verkis inter 1889 kaj 1900, li montras per trafe logikaj argumentoj kaj analizado, kiel kaj kial nur Esperanto povas esti elektita la internacia lingvo.

D. "Malferma parolado" — Kvara Universala Kongreso, 1908, Dresdeno: En tiu ĉi parolado, kiu estis publikigita la unuan fojon en *Lingvo internacia* en 1908, Zamenhof pritraktas la malutilon de diskutadoj pri reformoj en Esperanto, ĉar ili malhelpas la evoluon de la lingvo.

DEMANDO 16

(la respondo aperos en nia februara numero)

Poetoj de ĉiuj landoj kaj epokoj ricevas inspiron de naturaj fenomenoj, kiel la vetero, jen bela kaj sunplena, jen malagrabla kaj pluva. Laŭ *PIV* pluvo estas "akvo gute teren defalanta de la densiĝintaj nubvaporoj". Tiu ĉi demando temas pri kvin poemoj originale verkitaj en Esperanto, kiuj pentras per vortoj diversajn aspektojn de pluva vetero. Ĉu vi povas trovi la fontojn de la citaĵoj kaj nomi la aŭtorojn?

A. Tiu ĉi poemo estas verŝajne la unua kaj plej fama originala poemo en Esperanto pri pluvo. Ĝi estis publikigita la unuan fojon en 1909 en la revuo *Kataluna esperantisto*.

*Pluvas kaj pluvas kaj pluvas kaj pluvas
Senĉese, senfine, senhalte,
El ĉiel' al la ter', el ĉiel' al la ter'
Are gutoj frapiĝas resalte.*

B. En 1926 aperis volumo kun amuzaj poemoj pri plej diversaj temoj. Unu el la versaĵoj priskribas, kiel pluva vetero ĉe la franca marbordo fuŝis la feriojn de la aŭtoro.

*Dum pluvo bruas Kaj ĝojas vere
Kaj vento skuas Pri la vetero
Mi malenuas Nur la kelnero
Kun vinbotel' De la hotel'*

C. Ankaŭ en 1926 estis eldonita poemkolekto de alia populara poeto. Pluvo falanta el la hungara ĉielo provokis raŭkan plendadon en unu el la plej bone konataj poemoj de tiu volumo.

*Sub tegmento staris kuvo
dum somera densa pluvo,
sed tegmento baris pluvon,
pluvo falis apud kuvon,
ĉar el pluvo kuv' ne havis,
pro l'soifo ranoj kvakis:*

*Kvavak kvavak kvak kvak
akva kuvo, akva kavo
kvak kvak kvak
kvakas ni al Akvoavo
kvak kvak kvak
kvar kvakantoj kvardekvoĉe*

ekzameno



Redaktas: B. Golden,
Csikász u. 11.III.3
H-8200 Veszprém, Hung.

RESPONDO 15

(pri la demando v. nian decembran numeron, p. 216)

A. "Eltiro el privata letero al s-ro B (N. Borovko)": En 1895 Zamenhof skribis ruslingvan leteron al Nikolaj Afrikanoviĉ Borovko por respondi ties demandon pri la deveno de Esperanto. Vladimir Gernet tradukis ĝin en Esperanton kaj ĝi aperis en *Lingvo internacia* en 1896. En tiu ĉi letero Zamenhof detale priskribas la junaĝajn travivaĵojn, kiuj instigis lin interesiĝi pri internaciaj lingvoj kaj krei Esperanton.

B. "Aldono al la 'Dua Libro de l' Lingvo Internacia'": En la *Dua*

libro Zamenhof promesis eldoni kajerojn kun la celo respondi demandojn kaj pritrakti problemojn. Nur unu kajero aperis, 22-paĝa broŝuro eldonita en 1889. Ĝi enhavas informojn pri la Amerika Filozofia Societo de Filadelfio, kiu ekinteresiĝis pri Esperanto post malaprobo de Volapuko, kaj ankaŭ klarigon pri la sola ŝanĝo, kiun Zamenhof faris en Esperanto post la eldono de la *Unua libro*. (Vidu demandon 4 de Ekzameno E).

C. "Raporto pri la 'Skriba Kongreso'": En majo de 1897 Zamenhof dissendis 6000 invitilojn al gazetoj kaj reprezentantoj de diversaj planlingvaj projektoj en ĉiuj partoj de la mondo, invitante ilin partopreni en "Skriba Kongreso" por decidi la demandon pri internacia lingvo. La kongreso fiaskis, ĉar la aliprojektoj rifuzis kunlabori. La raporto aperis en *Lingvo internacia* en 1897.

Ĉ. "Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia": Tiu ĉi verko, la plej grava el la esperantismaj verkoj de d-ro Zamenhof, aperis en *Fundamenta Krestomatio* sub la pseŭdonimo Unuel (= unu el...). En

*kvartet-kvakas plenriproĉe
pro mankhav' de l'kava kuvo
en la akvokuv' sen pluvo
kvak kvak kvak! !!!!*

Ĉ. Latvujo estas pripluvita en tiu ĉi iom pesimisma poemo de juna poeto, kiu debutis en la 30-aj jaroj.

*Hieraŭ pluvis, kaj hodiaŭ pluvas
kaj morgaŭ same, lace glitos gutoj;
kaj same, lace iros la minutoj
de mia viv', sencela kaj enua.*

Ja ĉiu tag' forlavis rabe ion!

Ja ĉiu nokto portas ion for!

Ja de l'pasinto restas nur memor'!

Ja por l'estonto havas mi nenion!

*Ne fendas plu ĉielon fulma glavo,
ne tremas tondre plu la firmamento.*

Ĉe la anguloj ploras ftiza vento,

kaj pluvas, pluvas, pluvas – tag' post tago.

D. Enkadre de simbola pluvo, poeto de fora ekstereŭropa lando filozofias pri la homo kaj la historio en poemo verkita en 1960.

*La pluvo, kiel larmoj de la tempo,
el l'okulo griza de l'mateno falas
(tempo, tempo),*

*ĝiaj fontoj pli malnovaj ol la historio,
kiun cerbe la nescio*

per kurten' tenebra forvualas.

Sur la trotuaro, el malklaro,

paŝas nepreciza homo,

plandas plaŭde tra la mondoploroj,

kvazaŭ el antikvaj foroj

iu vagserĉanta kaj sen domo.

Kaj ekŝajnas, ke esence ĉiam tiel estas

malgraŭ civilizoj, spertoj, lertoj –

la homo kaj la pluv' senfina.

Esperanto en radio

Pri aliaj detaloj vidu nian revuon de novembro 1977 (p. 198).

SVISA RADIO. Notu kelkajn ŝanĝitajn ondolongojn en la decembra rubriko de la revuo. La disaŭdigo estas nun ankaŭ speciale direktita al Sud-Ameriko per ondo 25.32m (11850 kHz) marde, ĵaŭde kaj sabate je la 21.35 GMT; ondoj 30.98m (9685 kHz), 25.60m (11720 kHz), 25.32m (11850 kHz) estas speciale direktitaj al Afriko je la sama tempo; aliaj ondlongoj estas precipe kapt-eblaj en Eŭropo kaj kelkaj aliaj mediteraneaj landoj.

RADIO ROMA. Neniu ŝanĝo pri tago kaj horo sed la uzataj ondlongoj estas nun jenaj: 41.24m (7275 kHz), 41.15m (7290 kHz), 31.33m (9575 kHz); la unua el ili estas disaŭdigata ĉiudirekten, la dua al la orienta Eŭropo, la tria al la norda Eŭropo. Multnombraj raportoj pri aŭdebleco estos utilaj al daŭra plibonigo de la programo; oni nepre mencienu nomon kaj specon de radio-aparato, tipon de anteno, daton kaj lokan horon de aŭskultado, ondlongon aŭ frekvencon, iun program-detalon, intensecon de radio-signal, interferon fare de aliaj radio-stacioj, kompreneblecon

de la elsendo-enhavo. Korespondantoj ricevos specialan konfirmo-karton kaj laŭ peto program-broŝuron, turismajn prospektojn aŭ aliajn publikaĵojn. Adreso: Radio Roma, Esperanto, C.P. 320, I-00100 Roma, Italio.

POLA RADIO. La esperantlingva programo daŭre estas dissendata dum duona horo trifoje ĉiun tagon. Konstantaj programeroj estas prezentataj laŭ jena plano: lunde, Esperanto-ekspreso, koncerto kun bondeziroj; marde, koncerto kun bondeziroj, trarigardo de la Esperanto-gazetaro, temoj de la semajno; merkrede, temoj de la semajno, vivo de la Pola Esperanto-Asocio; ĵaŭde, vivo de PEA, leterkesto; vendrede, leterkesto; sabate, semajno en Pollando, panoramo de internaciaj eventoj; dimanĉe, semajno en Pollando, panoramo de internaciaj eventoj, Esperanto-ekspreso. Raportoj pri aŭskultado, rimarkoj, kritikoj estas bonvenaj ĉe Pola Radio, Esperanto, Poŝtkesto 46, PL-00-950 Warszawa, Pollando. Pli detala programfolio estas sendata al korespondantoj.

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,75 gld. (1 internacia respondkupono). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj.

LITERATURA MONDO: La Libro-servo de UEA disponas pri nuraj ses kompletoj de la plej fama revuo en la historio de la Movado. Temas pri restinta stoko de la japana re- preso el 1975/76. Prezo de la 6-voluma kompleto: 330,00 (por Nederlando 342,00) gld., inkluzive la sendokostojn.

La periodaĵo *Etnismo* ne estas eldonata de la Asocio Internacia por la Defendo de la Minacataj Lingvoj kaj Kulturoj (v. en la *Katalogo 1977/78* de la Libro-servo de UEA, p. 232) sed de s-ro U.J. Moritz, kiu ankaŭ redaktas kaj administras ĝin.

La Asocio por la Enkonduko de Nova Biologia Nomenklatur, Her-tendreef 12, B-2180 Kalmthout, Belgio, propagandas inter sciencistoj la uzon de Esperanto-terminaj sciencaj nomoj de bestoj kaj plantoj. Membroj en pli ol 30 landoj.

Polino 38-jara deziras korespondi tutmonde: Agnieszka Szmytkowska, Str. Lumumby 40 K. 1, PL-80-371 Gdańsk, Pollando.

Internacia Libro-Klubo Esperanta havigas al vi la novajn librojn plej facile, plej rapide, plej malmultekoste. Informas: ILKE, Sdr. Alle 29, DK-8000 Aarhus C, Danlando.

"Mahatmo Gandhi" – Mendu kontraŭ 6 rpk. ĉe Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz, Caixa Postal 3133, Rio de Janeiro, Brazilo.

MONDCIVITANOJ adoptis Esperanton en sia kongreso (1977). Por plenumigi tiun decidon la minoritato de esperantistoj inter la Moncivitanoj ege kresku – Volpelière, 8, rue Rouget de Lisle, F-30000 Nîmes, Francio.

Pri klasika muziko deziras korespondi kaj interŝanĝi il. poŝtkartojn kun la tuta mondo: F-ino Marta Lanau Serra, Via Layetana, 24 bis 6°, Barcelona-3, Hispanio.

Nek perforto, nek apatio, sed nur realigo de novaj ideoj plibonigos la estonton. Eksciu la ideojn el la serio "Internacia diskutejo" de d-ro Hartl, Vieno. Vidu antaŭajn anoncojn.

Finfine aperos la Skota Antologio, kun enkonduko de W. Auld. Eld. KARDO, 16 Woodlands Drive, Coatbridge ML5 1LE, Skotlando. Prezo £3.20. Antaŭpagantoj ĝis la 1-a de majo 1978 pagas £2.80, krome rajtas havi kun 25% rabato 3 eldonaĵojn de KARDO laŭ elekto (vidu UEA-katalogon, p. 79)

HEROLDO

DE ESPERANTO

LA PLEJ POPULARA SENDEPENDA INTERNACIA ESPERANTO-ORGANO

De 57 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- 17 numeroj jare
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Kultura paĝo pri literaturo, arto, muziko, sporto, kinoarto, ktp.
- Duobla Kongresa numero
- Libera Tribuno de la legantoj
- Literatura kaj scienca suplementoj

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA

Jarabono: 400 belgaj frankoj aŭ egalvaloro.

Mendu provnumeron ĉe la redakcio: Rue de la Reinette (Pippelingstraat) 13, boŝte 28, B-1000 Bruselo

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska

ABONU AŬ REABONU LA ĈINAN MONATAN GAZETON EN ESPERANTO

EL POPOLA ĈINIO



1. Periodo de la abonvarba kampanjo 1978:
de la 1-a de nov. 1977 ĝis la 28a de feb. 1978

Novaj aŭ renovigaj abonantoj, kiuj faras siajn abonojn en la periodo, povos senpage ricevi ekzempleron de grandformata kalendaro de 1978 kun koloraj ĉinstilaj pentraĵoj.

2. Abonprezoj:

1 jaro	£0.90	US\$ 2.20	Gld. 6.00*	FF 10.00
2 jaroj	£1.35	US\$ 3.30	Gld. 9.00*	FF 15.00
3 jaroj	£1.80	US\$ 4.40	Gld. 12.00*	FF 20.00

3. Estu abon-varbantoj de EPĈ, sekve vi ricevos ĉinstilajn memoraĵojn.

4. Peranto: Universala Esperanto-Asocio,
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

Ĝenerala distribuanto: Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN, P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio
SPECIMENO KAJ ABONVARBILO SENPAGE AKIREBLAJ LAŬPETE

* Nederlandanoj pagas la enlandan imposton de 4% kaj la prezoj por ili sekve estas 6,24, 9,36 aŭ 12,48 gld.

LA ESPERANTISTA KULTURDOMO
Kastelo GRESILLON, F-49150 Baugé, Francujo

KULTURAJ ARANĜOJ 78

PASKO:

(Alveno sabaton, la 8an de aprilo; foriro sabaton, la 15an de aprilo): • Renkonto de infanoj (akompanataj de plenkreskuloj) • Kiel gvidi kurson? (praktika pedagogio).

SOMERO:

Unua periodo (Alveno lundon, la 3an de julio; foriro sabaton, la 22an de julio): • Diversstemaj prelegoj • Diskutoj • Distraj programoj • Ekskursoj • Praktikado de la lingvo (kursoj) • La 3an de julio: Interkona vespero.

Dua periodo (Alveno dimanĉon, la 23an de julio; foriro sabaton, la 12an de aŭgusto): • Kurso por komencantoj • Praktikado • Supera kurso • Man-aktivaĵoj • Ekskursoj • La 23an de julio: Interkona vespero.

Tria periodo: (Alveno dimanĉon, la 13an de aŭgusto; foriro sabaton, la 2an de septembro): • Pri la programo vidu sub "Dua periodo" • La 13an de aŭgusto: Interkona vespero.

Noto: Ankaŭ ekzamenoj estos organizitaj, sed la celo de la kursoj ne estas la preparado de tiuj ekzamenoj.

kontakto




Postkongresa
koktelo

1977, n-ro 54

Por sciï pli

Ankoraŭ iom malakurata, sed neniel malaktuala. "Kontakto" — gazeto en kiu junaj homoj prezentas junajn ideojn. Ne risku mem malaktuali! Ne restu ekster la orbito de la junulara forumo, abonu — kaj vi ne povos rezisti al legotento.

Ĉiu membro de UEA malpli ol 26-jara aŭtomate ricevas "Kontakto"-n. Simpla abono por la jarkolekto de 1978 kostas 16,50 gld. Mendu ĉe la kotizperantoj de UEA aŭ de la Centra Oficejo.



ABZ de amo estas havinda popularscienca verko por ĉiu

Ĉi tiun 274-paĝan enciklopedion de la seksa vivo verkis danaj psikologoj Inge kaj Sten Hegeler, kaj tradukis Ib Schleicher kaj August Weide.

Formato: 25cm. Ilustrita. Bindita per ledumita plasto.

Prezo: 33,78 (por Nederlando 35,13) gld. plus 10% por la sendokostoj.

Mendu ĉe: UEA, Nwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

